

INTERNACIA  
MONDLITERATURO

---

SADOVEĀNU  
Nobela  
Peko

21

---

FERDINAND HIRT & SOHN  
LEIPZIG, ESPERANTO-FAKO

*Internacia  
Mondliteraturo  
Volumo 21*

*Al S-ro Franz Uebliör  
Sekcia ĉefo de Ekst.Af.-Vir.  
respektoplene  
Vieno, 10.6.32  
Fib. Horaniu*

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj  
el ĉiuj naciaj literaturoj

---



---

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1929  
ESPERANTO-FAKO

MIHAIL SADOVEANU

---

NOBELA PEKO

El la rumana originalo tradukis  
kun permeso de la aŭtoro

Tiberio Morariu

---

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1929  
ESPERANTO-FAKO

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ  
COPYRIGHT 1929 BY FERDINAND HIRT & SOHN  
MADE IN GERMANY

Esper. 386 I



J-11200

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

## TABELO DE ENHAVO

	Paĝo
Antaŭparolo	6
Teknikaj Rimarkoj	8
Nobela Peko	9
En Arbaro Petriŝor	49
La Sciigantoj	58

## ANTAŬPAROLO

Mihail Sadoveanu naskiĝis en Pascani<sup>1</sup> (Rumanujo) en la jaro 1880. Estinta deputito; membro de la Akademio Rumana.

Sadoveanu longe studadis la fremdajn literaturojn, li eĉ multe tradukis el la franca literaturo, interalie „Rakontojn“ de Maupassant — en lingvaĵo egale majstra al la originala — tamen li ne lasis sin influi de fremda efiko.

Sendube Sadoveanu estas la plej forta kaj valorplena nuntempa prozisto rumana, posedanta riĉan verkarton, fluan talenton, en la plej bela kaj originala lingvo rumana.

Kiel potenca prikantisto de la rumana pasinto, kiun li amas, kiel kverko sian radikon, kaj pentristo de la rumana tero kun riĉaj linioj kaj koloroj, Sadoveanu estas unu el tiuj, kiuj antaŭ la akademia eternigo jam akiris senmortecon ĉe la publiko lin adoranta.

Dum la tradukado de liaj noveloj en mia animo klare resonas la vortoj de lia akcepta parolado farita ĉe la eniro en la Akademion, kiam li emocie menciis la popolan poezion, kies riĉaĵoj nutras lian inspiron jam de pli ol dudek jaroj: „... la estinto pulsas en mi kiel la sango de l' forpasintoj; ... mi sentas min kverko kun mil kaj mil radikoj eniĝintaj en la teron de mia nacio ...“

---

<sup>1</sup> Elparolu Paŝkanj.

Sadoveanu rimarkiĝas kiel la plej fekunda kulturanto de la rumana prozo. El lia multnombra verkaro ni mencias: historian romanon „*La falkoj*“; serion da novelaroj: „*Sufokitaj doloroj*“, „*Rakontoj el la milito*“, „*La drinkejo de Oĉjo Precu*<sup>1</sup>“, „*Festaj rakontoj*“, „*La memoroj de kaporalo Georgica*“, „*Homoj kaj lokoj*“, „*La tombo de infano*“, „*Ĉe ni en Viișoara*“, „*Malnova historio*“, „*La kanto de l' memoro*“, „*Vesperaj rakontoj*“, „*Folioj en uragano*“, „*La akvo de l' mortintoj*“, „*La notoj de Nikolao Manea*“, „*Aŭtuna foliaro*“; romanojn: „*Rifuĝa epoko*“, „*Velkanta floro*“, „*Fraŭlino Margareto*“ kaj „*Venis muelilo sur la Siret*“.

Liaj rakontoj kaj skizoj el la popola kaj soldata vivo, same liaj romanoj respegulantaj diversajn mediojn de la socio, lasas nin supozi, ke tiu ĉi lerta prozisto intencas pripentri la plenan bildon de la rumana socio.

En la novelo „*Nobela peko*“ la plumo de l' verkisto majstre revivigas la marĉan regionon kun la sunleviĝoj kaj sunsubiroj, vasta kanejo, birdaro kaj fiŝoj . . . kaj tiu ĉi vivo revekita de la verkisto, kvazaŭ ronda striaro sur la akvo, fine iĝas brila kaj trankvila spegulo, klare montranta al ni la malnovepokajn nobelon kaj popolanojn, en la kadro de emociiga vivodramo.

La skizo „*En Arbaro Petrișor*“ priskribas kortuŝan agonion de mortevundita kapreolino, en la mistika mondo de l' arbaro vibranta de mil vivenergioj. Pri tiu ĉi skizo trafe diris profesoro Nikolao Iorga<sup>2</sup>, la konata historiisto kaj literatura kritikisto rumana: „Ĉi tiu novelo posedas poezion kiel eble puran kaj indan por stari samvice kun la plej bonaj verkaĵoj verkitaj de homa mano — kiu ofte mortigas — pri la doloro de l' estaĵoj nur

---

<sup>1</sup> Elparolu Preku. — <sup>2</sup> Elparolu Jorga.



paroli ne povantaj por plendi. . .“ Pri la traduko de la skizo sinjoro Petro Stojan, L. K., skribas: „La belstila ‚*Petriŝora Arbaro*‘ estas unu el la plej belaj juveletoj de la Esperanta literaturo; en ĝi estas atingita la plej alta punkto de la stila perfekteco.“

La lasta tradukaĵo de la volumo „*La Sciigantoj*“ pentras ĉarman popolan kutimon kristnaskan. —

Tie ĉi mi esprimas sinceran dankon al samideanoj A. Ĉe, S. Prager kaj H. Harabaĝiu afable trarigardintaj la manuskripton kaj helpintaj min per teknikaj konsiloj, precipe ĉe la esperantigo de l’ ornitologiaj nomoj. Ne malpli danka mi estas al sinjoro D-ro Dietterle, la gvidanto de l’ „Internacia Mondliteraturo“, kiu okaze de nunjara paska konferenco en Praha afable esprimis la deziron, ke ĉe „Internacia Mondliteraturo“ ankaŭ la rumana literaturo estu reprezentata kaj honorigis min per la komisio de la traduko.

Cluj, en Septembro 1927.

*Tiberio Morariu.*

## TEKNIKAJ RIMARKOJ DE LA TRADUKINTO

La antaŭnomoj estas aŭ nur simple transskribitaj fonetike, — ekzemple Chiva = Kiva — aŭ ili estas tute esperantigitaj, kie tio montriĝis preferinda, ekz. Niculita = Niĉjo.

Familiaj nomoj — memkompreneble — restis netuŝitaj.

Fonetike mi transskribis ankaŭ propran nomon „Jezer“ = Jezer, ĉar la tro ofta ripetigo de la originala formo en la esperanta teksto estus konstante ĝeninta la leganton.

Elparolo, prononco de fremdaj vortoj, kie ili diferencas de la esperantaj elparolo kaj prononco, estas speciale signitaj en piednotoj.

## NOBELA PEKO

### 1.

Nia bieno estas malproksime de marĉo Borcea<sup>1</sup> plena de ĉasaĵoj kaj fiŝoj, — kuŝanta je du rajdhoroj ene de Baragan<sup>2</sup>.

Dum la somero de l' jaro 1896 mi restis sola, kun la administranto, kun la laboristoj kaj kun la vastaj kampoj, en la senkompata varmo de l' somero. Niaj partianoj fariĝis registaranoj kaj mia patro, politikulo, loĝis en Bukureŝto, plenŝarĝita de gravaj aferoj. Miaj patrino kaj du fratinoj estis kun li. Mi ne sciis kion fari en la granda, nun dezerta, blanka domo. Ankaŭ mia junaĝo bezonis ion, mi tion bone sentis; mi estis maltrankvila, kaj kvazaŭ serĉante tiun ion, mi komencis iradi ĉasi en Jezer<sup>3</sup>, dum la libera tempo.

Tie, en Jezer, mi amis la plej unuan fojon kaj mi preskaŭ mortis tie.

La stepo estis kara al mi. Mian tutan infanaĝon kaj ankaŭ la junaĝon mi pasigis en Baragan. Sunbrulita dum somero, ventblovita dum vintro, dezerta kaj malgaja, sen rando, sen riveroj, sen la malvarmeto de l' floroj kaj arbaroj, rekta senlimo, — kaj tamen ĝi estis la plej kara tero al mia animo.

---

<sup>1</sup> Elparolu Borĉa.

<sup>2</sup> Baragan = stepo en departemento Ialomica (elp. Jalomica), Rumanujo.

<sup>3</sup> Nomo signifanta lageton, lagon.

Tie oni ne vidas proksime blupintajn montojn, leviĝantajn kun la suproj en la ĉielon, eĉ ne maljunajn arbaregojn kun malmildaj kaj eternaj kantoj, nek la kukolo kantas al ni bonŝance, kiam torentoj kuras ŝaŭme rondsaltantaj sur la ŝtupoj de l' deklivoj, kiam la herbejoj pleniĝas per floroj kaj kantistaj gastoj. Tie oni aŭdas dumvintre la muĝegon de la neĝblova nordvento en dezerto senfina, sur neĝa senlimo, sub kiuj kuŝas, malgajaj kaj maloftaj, vilaĝoj disjetitaj en la vasto. Kaj somere ĉu nuda tero estas videbla, ĉu grandaj kampoj, sur kiujn la suno verŝas fanditan oron, — kie la homoj pene laboras, kurbiĝintaj, kvazaŭ sub ŝarĝoj dolore pezaj. Tamen, en ĉi tiuj lokoj avaraj je kutima beleco, mi sentis la frostotremon de l' senfina horizonto, kiam la ĉevalo min portis laŭ agloflugo sur senvoja vasto, kaj la melankolio de l' vesperkrepuskoj trapenetris min per la profunda mistero de l' nekono de maro senlima. Kaj iom post iom, dank' al la junaĝo kaj dank' al la deziro, mi ekvidis nekonjektitajn belecojn.

Mi ĉiam vekigis matene, kiam la suno, ruĝa kiel sango, flamatingis la fenestrojn. Vestinte min, mi rapide eliris. La ĉevalo atendis min ĉe la ŝtuparo, apud la akacioj gardantaj la domon, nian palacon, kiel nomis ĝin paĉjo, Dio lin pardonu. La malproksimon vualis vaporo; alaŭdoj kantis super niaj kampoj. Mi forrajdis kun la administranto, malgrandulo kun boraj okuloj, kun longa liphararo. Malmulte mi parolis kun li, mi tute ne ŝatis lin. La ĉevaloj trotis obtuze sur la polva vojo, dum la kapturniga trilado de l' alaŭdoj, tremigantaj melodiajn voĉkaskadojn en la lumo de la altoj. La senfina kampo graveda je pano, ektremis pro bloveto de l' matena vento, mallumiĝante en terkavetoj, ore brilante ĉe la valrandoj. Kaj ni pasis tra la herbosulkoj malsekaj de

roso, tra la armeo de silentaj rikoltantoj, — dum miaj pensoj vagadis fore. . . .

Dum la tago regis sufoka varmego. Ni ripozis ie, en la ombro; mi soifis kaj ne havis akvon; mi rigardis la rondturnajn makulojn de l' varmego, kaj miaj okuloj fiksigis malproksimen, en la nekonatan vaston, — kaj dum tiuj momentoj mi tiel enuis kaj sentis min tiel sola, — kaj mi demandis min: kial mi vivas ankoraŭ?

Kiam vesperiĝis, por iel pasigi la tempon, mi rajdis al unu el tiuj etaj, ruĝaj stacidomoj en bukedoj de akacioj, laŭlonge de l' fervojo rekta, senfina. De tempo al tempo mi rekontis solecan drinkejon, kie, dum maloftaj intertempoj, aŭdiĝis voĉhaoso tuj poste mortkovrita de la profunda silento de l' dezerto. Poste mi atingis la stacidomon, mi atendis vagonaron venintan de malproksime kaj pluenpasantan en la nebulan malproksimon de l' oriento. Ĉe iu fenestro, meze de verdaĵo kovranta la muron, montriĝis virina kapo ornamita kiel dum festotago; la oficistoj malrapide moviĝis, interŝanĝis salutojn kun la konatoj; la maŝino spirblovis, foriris; la stacidomo restis eta kaj forlasita en la vesperkrepuska paco. Mi ekrajdis en monotona troto, enpensiĝinte; la silento de l' dezerto ĉirkaŭvolvis min de ĉiuloke, la ombro konkeris la kampojn kvazaŭ ondaro invadanta el oriento, kaj de temp' al tempo fervoja dometo signosonis malgaje, preskaŭ plore, en la vasto: lang-ling!

La suno, delonge subirinta ĉe la griza okcidento, sendis ankoraŭ rozkolorajn brilojn supren, al la senmovaj nuboj, en la alto. En la kreskanta mallumo estis rimarkeblaj malproksimaj vilaĝoj, unue pro fumetoj, poste pro lumoj perdiĝantaj en la nokto kiel lampiroj sur vasto senranda, kiuj de iom da tempo kunmiksiĝis kun la briletantaj steloj de l' horizonto.

Kaj mi malgaje kuŝiĝis en la dezerta domo, nesciante kion fari; mi ne povis legi, ne povis skribi, terura enuo pezpremis min.

Dragomiro, la administranto, kun siaj etaj okuloj bore rigardis min, kvazaŭ li estus leganta en la profundo de mia animo kelkfoje; tordetante sian liphararon, li komprenigis al mi per rideto, ke por juna nobelo, kia mi, ekzistas kuracilo kontraŭ la enuo.

„Nu, estus eble . . . ne koleru . . . Ĉi-loke, ĉe ni, oni povas trovi viglan virineton, aŭ belan knabinon . . . Hm!“ kaj li fikse rigardis min. Sed la administranto ne plaĉis al mi kaj mi neniel volis, ke li ekkonu miajn sekretojn kaj malfortecojn. Mi forsendis lin per kelkaj vortoj kaj mi atendis. Sed tio, kion mi atendis, malfruis, kaj la enuo ĉiam pli kaj pli malserenigis mian animon.

Tamen, iun tagon, subite kaptis mian atenton parolo de Dragomiro:

„Ĉasaĵo kia en Jezer, nenie estas en la mondo . . .“

Mi ĝoje turnis min al li. Almenaŭ mi havis novan amuzon.

„Kion vi diras, Dragomiro? . . .“

„Mi parolas pri Jezer. . . Karulo-karuleto! kia ĉasaĵo estas tie! Via hararo leviĝos sur la kapsupro. . .“

„Sciu, ke mi iros tien por ĉasi. . .“

La okuloj de Dragomiro ekbrilis. Li ĝojis, ke li restos sola kaj povos denove agi laŭ sia plaĉo. Li rakontis al mi aron da mirindaĵoj pri Jezer — mi opiniis, ke li ne finos. Kaj tutan nokton mi pensadis pri la plezuro de ĉaso en la marĉejo de la Danubo, kaj duan tagon mi decidiĝis tien rapidi sur la ĉevalo, kun la pafilo.

Jene komenciĝis miaj rajdvizitoj al Jezer.

La unua ĉaso restis tute senfrukta. Mi lasis la ĉevalon ĉe la drinkejo, rande de la vilaĝo, kaj mi iris mal-

supren al la akvo, proksime al la fervoja linio. La blanka reto de l' ferponto etendiĝis malproksimen, aliflanken, trans la marĉon. En la marĉo plena de verdaj kreskaĵoj staradis la ĉevaloj ĝisbruste kovritaj, malvigle maĉante la verdaĵon, kiu en sennombroj fasketoj naĝis sur la supro. Pli ene, post tiuj marĉlagoj akvomankaj subite montriĝis grandaj arbejoj kun maljunaj salikaroj, kiuj enkadris largajn kaj profundajn lagojn. Mi iradis kun la pafilo enmane, kun okuloj fiksitaj je ĉi arbaroj malsekaj, plenaj de mallumo kaj sovaĝaĵoj, kun orelo streĉe atenta pri la plaŭdo de la ondoj, pri l' susuro de la salikfoliaro. Jen mi vidis anasaron en flugo rapida, jen mi vidis galinagojn kun pezeca flugilfrapo super la kanpenikaro, poste mi aŭdis la kriojn de l' tetroj kaj fulikoj, sed mi estis tro malproksime de ili. Mi komprenis, ke mi bezonas kamaradon, ĉasiston tiulokan, boaton, kiu portu min al la birdpasejoj kaj kaŝlokoj. Kaj mi lasis la ĉasaĵon senĝene ŝtelflugi sur la surfaco de la lago, kaj leviĝi en longaj anguloj sur la ruĝon sunsubiran. Kun animo plena de la ĉirkaŭa beleco, miloj da strangaj voĉoj de la vespera krepusko en la marĉolagoj, mirindaj kolorludoj de l' akvo sub la radioj adiaŭe briletantaj, — mi vagadis dumlonge, hazarde, sen certa celo.

Kiam mi revenis, la drinkejestro rigardis kun la angulo de sia okulo al mia malplena tornistro.

„Nu, mi vidas, ke vi nenion kaptis. . .“

„Mi ne havis boaton. . .“

„Nek boaton, sinjoro, nek homon konanta la lokojn. . . Se vi deziras ankoraŭfoje veni al ni, mi instruos al vi, kion vi devas fari. . . Ĉu vi scias ion? Diru al mi. . . nur vorteton! nenion pli, kaj mi sciigos Marenon. . . Vi do volas nepre ĉasiri?“

„Nature, ke jes.“

„Tiam diru nur vorteton al mi, kaj mi sciigos Marenon... Tiu ĉi, sinjoro, estas granda ĉasisto. . . Kaj ne nur ĉasisto, — ankaŭ fiŝisto, sinjoro, mi diras al vi. . . Kune kun li, vi iru ĉasi, kaj poste parolu!“

La drinkejstro parolis al mi entuziasme, fiere pri Jezer kaj Mareno.

„Bone, tiam ĉe mia denova veno mi vokos ankaŭ Marenon. . .“

„Aŭskultu, sinjoro,“ diris rapide la drinkejstro, kun okuloj suprenlevitaj, kaj kun unu fingro antaŭe, kvazaŭ li volus rememori ion, „aŭskultu! . . . ni vokos lin kaj vi interkompreniĝos per du vortoj. . . Vi honorkompensos lin per brando, sinjoro. . . Unu glaseto, du, tri, kiom vi bonvolos . . . kaj la negoco estos kontraktita! mi diras al vi, je mia honoro! Mi, sinjoro, mi estis kaporalo en la armeo, ĉe la artilerio! . . . Mi nomiĝas Sando Popescu<sup>1</sup>!“

Kaj li rigardis min subite eksilentinte, kun la mentono sur la brusto, kvazaŭ li volus pli bone vidi mian ekmiron. Poste li ridetis kaj alkaresis per sola fingro, la montra de la dekstra mano, la mallongan lipharon nigran, ŝajne desegnitajn per karbo sur la ruĝebruna kaj plenvanga vizaĝo. Li rigardis min per la etaj, gajaj okuloj.

„La afero estas preskaŭ aranĝita! . . . Do kiam vi venos al ni?“

„Jam morgaŭ. . . Nur vi pretigu al mi bonan manĝaĵon. . .“

„Ne havu zorgon! Mi ja igos la edzinon buĉi kokinon, sinjoro. . . Mi havas ankaŭ bovinon, sinjoro! Je mia

---

<sup>1</sup> Elparolu Popesku.

honoro! Mi estis kaporalo ĉe la artilerio! Mirindan manĝaĵon mi pretigos al vi. . . La afero estas do decidita. . . Kian manĝaĵon vi ŝatas?“

Kaj li denove rigardis min, ridetante, kun la mentono sur la brusto. Poste li salte ekmoviĝis kun fingro tentita supre.

„Jen! bonan rostaĵon kaj ĉio finita! kaj ĉorbon<sup>1</sup>! Supon kaj rostaĵon! Jen! Kaj mi vokos Marenon kaj la afero estas finita! Je mia honoro! . . .“

Kaj li restis antaŭ la drinkejo, kun la manoj surtalie, kun la larĝaj tolpantalonoj kvazaŭ ŝvelitaj de ventblovo, kontente rigardante post mi, dum mi rapide foriĝis sur mia Korvo, malaperante en la ombroj de Baragan, al la forviŝita sunsubiro preskaŭ senkolora.

La sekvintan tagon, frue, kiam mi deĉevaliĝis, Sando elrapidis tra la pordo de l' drinkejo, kvazaŭ puŝita de iu, kaj li kriis, al etulo, kiu rostumis sin ĉe la suno:

„Etulo-uleto! kuru al Oĉjo Mareno!“

Dum li kondukis mian ĉevalon en la stalon, dum li kriordonis al la edzino: „U! Ana, moviĝu! buĉu la kolorplumulon“, dum li eniris, amike ridetante, en la malaltan, fumoplenan ĉambreton, — Mareno, la pafisto, alvenis, kun la knabo kvazaŭ ĉevalido post si.

„Jen estas li!“ diris fiere Sando, etendante sian manon al la viro.

La pafisto, malaltulo, kun tre larĝaj ŝultroj, seka vizaĝo, kiun malheligis barbo maldensa, hirta, rigardis min sen palpebrumo, sen rideto, per du okuloj rondaj, verdaj. Per la dekstra mano li tenis ĉe la tublito la pafilon pendigitan sur la ŝultro, kaj la granda, nigra mano, kun longaj fingroj ostaj, nodecaj, ŝajnis al mi terura.

---

<sup>1</sup> Supo kun acida suko kaj pecetoj da viando.



Mi ridetis:

„Ĉu vi estas Mareno? . . .“ Poste mi ne plu sciis kion diri al li. „Kion vi kutimas?“

„Brandon, glaseto da brando sufiĉas al mi“, diris li mallaŭte, kun mola kaj malalta voĉo.

„Unu glaseto, du, kiom vi bonvolos“ parolis kun rideto Sando Popescu, frotadante siajn manojn.

La pafisto silentis dum momento, rigardante la teron, poste li fiksis siajn rondajn okulojn je mi:

„Ĉu vi estas la nobelo el Sărățeni<sup>1</sup>?“

„Jes!“ interkriis subite la drinkejestro; „nobelo Niĉjo!“ Kaj li zorgeme metis sur la tablon tri glasetojn da brando. La ĉasisto malrapide sorbis la trinkaĵon, kun okuloj duone fermitaj. Li rimetis la glaseton kaj viŝis sian hirtan lip-haron.

Poste li denove ekparolis kun sia laca voĉo:

„Mi aŭdis, ke en Sărățeni la kamparanoj pli bone vivas. . .“

Sando ne lasis min respondi. Li rapide altenlevis la dekstran montrofigron:

„Kiel? bonege! Tie, kvazaŭ en la sino de Abrahamo! Mi tion diras al vi, Oĉjo Mareno, je mia honoro!“

La viro kapbalancis. La drinkejestro enmanigis al li la duan glaseton. Li ankaŭ tiun ĉi elsorbis malrapide. Poste li serĉadis en la zona ujo. Li kraĉis kun abomeno kaj murmuretis:

„Ne estas! . . .“

„Kio?“

„Tabako! tabako!“ kriis Sando. „Lasu, ĉar nobelo Niĉjo donos al vi pakajeton! . . Tiu estas nobelo; ververe! Kaj ĉu vi vidis, kian ĉevalon li havas? Flugulon, Oĉjo Mareno! . .“

---

<sup>1</sup> Elparolu Saracénj.

La ĉasisto malligis la tabakujon kaj elprenis nigran pipon el la bota piedingo. Li blovis kelkfoje forte en la tubon kaj albatis ĝin ĉe ĝia kapo al la tablorando.

Subite li laŭte ekparolis, etendante al mi la maldekstran manon grandan kaj nigran.

„Ne! Ĉe ni ne plu estas eble, ke oni povu ekzisti! Min malriĉigis la formortinta nobelo, kaj kiu nun venis, eĉ pli enfundigis min en la mizeron . . . Al mi restis nur la domo — kaj la pafilo . . .“

Ŝajnis, ke en lia voĉo sonas malmilda stertoro dolora. La verdajn okulojn min rigardantajn trapasis ekbrilo.

La drinkejstro okulsignis al mi kaj tuis. Poste li ekprenis la pafilon de Mareno kaj etendis ĝin al mi:

„Vi, moŝto, posedas centran fajron! Mi tuj ekvidis! mi estis kaporalo ĉe la artilerio . . . Oĉjo Mareno havas alispecan, malnovan . . . Sed bonan pafilon . . . ĉu vi scias, kiel ĝi pafas?“

„Se ĝi ne estus bona, ĝi ne estus daŭrinta ĝis nun!“ diris denove, molvoĉe, subite trankviliĝinte la ĉasisto, plenŝtopante sian pipon per tabako.

„Tiel estas, li pravas!“ kriis Sando Popescu. „Sed ankoraŭ glaseton da brando, — kion vi diras, Oĉjo Mareno?“

Mareno maljese kapbalancis kaj surŝultrigis la pafilon.

„Ne, sufiĉas al mi, nun ni iros . . . Subiras la suno . . .“

Ni ekiris al Jezer, dume Sando dorse akompanis nin per siaj okuloj kun la manoj sur la talio, kun rideto sur la lipoj.

Dum la tuta vojo, ĝis la marĉlago, Mareno nenion diris. Li laŭte en- kaj elspiris la pipfumon, kun la rondaj okuloj fiksitaj antaŭen, eligante blujajn fumrondojn, kiuj altiĝis ĝis lia ĉapelo — verdiĝinta de pluvo kaj tempo — kaj fandiĝis dum momento en la brilan aeron. Li iris kviete, la grandaj botoj, kun la piedingoj ĝis la genuoj,

sonis laŭte sur la malmola tero, dufoje ĉiu boto; unue la kalkanumo, poste la dika plando. La larĝaj pantalonoj el helruĝa lano, la nigra jako, surhavis grandajn makulojn de sango kaj grasaĵo; la fiŝoskvamoj gluiĝintaj ĉe la vest-faldoj verdete brilis en la oblikva sunradiaro.

Ni malsupreniris rekte en la marĉon. La disaj dometoj de l' vilaĝo, kun lumvualoj, forrestis de ni, pentritaj sur la serena horizonto. Ene de senmova lageto, en koto, inter rompitaĵoj junkoj, montriĝis boato, nigra de gudro, alligita per dika ŝnurego al paliseto pike fiksita en la argilan bordon.

„Jen mia boato!“ aŭdigis subite la ĉasisto. „Pli ene estas la kaŝejo de l' remiloj . . . Kaj rigardu, tie, sur la bordo, inter salikoj, super la arbetejo de l' marĉo, mia dometo . . . Tiom ankoraŭ restis al mi! . . .“

Kaj li rigardis min malserene, kun sia dolorstertoro vekiganta en la voĉo.

La viro plaĉis al mi, kvankam li parolis tiom malmulte kaj rigardis min tiel strange. El lia tuta kolerema mieno, el lia profunda voĉo, estis rimarkeble, ke li trapasis dolorajn vivuraganojn. La ĉagrenoj fosis sulkojn sur lian vizaĝon kaj sekigis lian parolfonton. Kaj rigardante lin, mi pensis pri liaj vortoj, pri „la maljuna nobelo“, pri la nova, pri la uragano eble katene retenita en la fundo de l' animo, de kie malfacile eliĝis la maldolĉaj vortoj: „Tiom ankoraŭ restis al mi! la dometo kaj la pafilo!“

Kaj mi volis diri al li konsolan vorton. Sed li turnis al mi siajn rondajn okulojn kaj diris fortvoĉe, vigliginte: „Haj, moŝto! enboatigu! Mi prenos la remilojn kaj ni ekveturos . . .“

Ni ekveturis per la boato kaj ni malrapide eniris la verdejon. El la vilaĝo venis longesonaj brutoblekoj, moltona sono de kolsonoriloj, kaj homaj voĉoj tiel klaraj, ke

ŝajnis, ke oni parolas proksime de ni, ie en la marĉo. Poste, iom post iom, la bruo formortis — kaj ni boatiris tra mallarĝaj pasejoj, inter la kanoj treme susurantaj en la ora sunbrilo. De temp' al tempo ekplaŭdis la akvo, tuj poste sonmortante; proksime de ni nigra ombro pasis tra lumostrio kaj la pafisto turnis sian vizaĝon al mi:

„Fuliko . . .“

Kaj ni denove pasis kaŝe en silento, dum iom da tempo. Poste, neatendite akra „mikmik“ skuvekis min el la trankvilo min konkerinta, flugilfrapo sonis, kaj la anaso supreniĝis sage flugante super la duberuĝa kanpenikejo, ekster la pafdistanco de la pafilo.

Post tio ni pluboatis kviete kaj pasis sub foliarkaĵon de granda salikejo.

La suno komencis malaperi, ora polvo filtriĝis tra la verda laŭbo kaj tremis en lumfloroj sur la senmova kaj malluma akvotolo. La kunplektiĝinta branĉaro formis nigrajn volbojn, sub kiuj ni pasis en senfina trankvilo, lasante vojeton de ŝtala skvamaro post la boato.

Kaj ni haltis inter du kavaj salikoj, ŝirmitaj, kvazaŭ de ombrelo, per densa branĉaro klininta sin ĝis la supraĵo de la marĉlago. Ni havis antaŭ ni gigantan spegulegon, kie la suno ruliĝis en fajronesto, inter du kanmuroj, malpeze balancantaj la pintaron pro bloveto apenaŭ sentebla.

Mareno frotis fajroŝtonon kaj ekbruligis la pipon, poste per disaj fingroj li rastis la grizan hararon post la orelojn.

Mi preparis la pafilon; malrapide mi retiris la ĉanojn, kiuj ambaŭ frapetis dufoje.

Nun la suno verŝis sangajn ondojn, malaperis ĉe la horizonto. Fuliko estis videbla, kun idaro post si, en la alia parto de la marĉolageto, en la kanejo.



„Ni havas ankoraŭ tempon!“ diris Maren, turnante al mi sian egalmienan vizaĝon. „Nun subiras la suno . . .“ Kaj li trankvile sorbfumadis sian pipon.

Oĉjo Maren', flustris mi, emante iom konsoli lin.

„Ej? . . .“

„Ĉu vi multe suferis ĉe la malnova mastro, kiu mortis? . . .“

Li levis al mi la verdajn, rondajn okulojn, kaj elprenis la pipon el sia buŝo.

„Mi suferis pacience“, diris li milde . . . „Sed ĉu mi povos ankoraŭ toleri ĉe tiu ĉi nova? — Kaj li demandis min per la okuloj. — Dank' al la maljuna forvaporigis tiu eraĵo, kiun mi penplene ŝparetis, kaj dank' al li estis enterigita mia edzino! . . .“

Kaj li rigardis min kruele, preskaŭ dentgrincante. En la verdaj okuloj ludis akvaj radioj. La maldekstra, nigra, nodeca mano leviĝis al mi.

Li volis ankoraŭ diri ion, sed la okuloj subite leviĝis brile kaj la manoj ekpemis la pafilon. Muĝo, kiel vento, pasis supre. Roteĝo da anasoj aperis super ni.

La pafilo ektondris, plenigante kun profundaj sonoj la maljunajn salikarbarojn. Akraj, miraj tetrokrioj respondis el la kanejo, kelkaj anasoj peze falis kun ruĝaj gutoj sur la akvon, dum la roto, kvazaŭ puŝpelita de uragano, subite turnis sin, altenleviĝis, malaperis super la arbetejo.

## 2.

El la silentado aŭ el la ŝirita, avara parolo de l' ĉasisto, mi ne povis kompreni multon. Kaj Sando, la drinkejestro, parolis tro multe kaj kion mi volis ekscii, tion li aŭ ne povis diri al mi, aŭ li ŝajnis, ke li ne komprenas. Kaj li antaŭeniris min per sia multa parolo, ridetis al mi, amike etendis la fingron, albrustigante la mentonon, ĵuradis je honoro, kaj kriadis, ke li estis kaporalo ĉe la

artilerio. Sinjoro Sando Popescu estis vulpo, kies ruzeco ne havis limon. La glasetojn da brando li nerimarkite ŝovetadis al la pafisto: la nobelo pagas! kaj la tabako, ĉu ĝi mankis, ĉu ĝi ne mankis el la zono, pakajeto ne malutilas: la nobelo pagas! Kaj per sia ruĝa vizaĝo kiel plena luno li ridetis tiel feliĉe, ke mi ne havis kion fari, mi silentis kaj pagis volonte.

Fakte, mi ankaŭ havis pro kio. Niaj embuskoj, niaj ĉasoj estis tre bonŝancaj. Mareno konis la plej sekretajn kaŝejojn de la sovaĝuloj kaj li ŝtelportis min per la boato al ili, malrapide, singarde, tiel majstre, ke mi ĉiam miris. Cetere la marĉo estis plenplena de anasoj, tetroj, galinagoj, ĉiuspecaj fluguloj kaj timemuloj, kun rondaj okuloj, kun longaj koloj, tremantaj kaj brilaj. Kaj kvazaŭ ankaŭ mia ĉasisto estus havinta ion el tiu kola fleksebleco malpeza, kun singardemo kaj timemo, kaj ion el tiu rigardo penetra, ronda, akra, verda, kiel la staranta akvo de l' marĉejo, rigardo, kiu maltrankviligis min.

Dum unu semajno la pasio pri embusko, pri ĉasaĵo en la marĉo, eniĝis en mian animon, sangon, senton. Mi venis streĉe, galopante, tuj kiam la suno komencis subiri, mi rapide pasis tra la drinkejo, kie atendis min Mareno kaj la brua konsilo de Sando, mi plenigis por la pafisto brandkarafeton kaj mi pagis du pakajetojn da tabako, kaj ni pasis malsupren al la ruĝeta striego de l' kanaro. En la trankvilo de l' vasta marĉo, la soleca muĝo de iu birdo vekis, kvazaŭ blekokrio, la forlasitejojn, kaj eksaltigis min. Per okuloj larĝe malfermitaj mi esploradis la ĉielon apud la linio de l' ruĝetaj kanpenikoj, ĉe la flamkolora okcidento, aŭ la longajn pasejojn en la kanaro, aŭ la mallumajn salikarkaĵojn, sub kiujn enfiltriĝis la steloj, lumfloroj, kaj mia koro ekfrapis rapide, kiam junka aŭ vimena vergo ŝanceliĝis. Nun mi povis fari

diferencon inter la milda blovtuŝo de l' vento kaj delikata tremeto, kiun kaŭzas la apudakva ŝtelflugoj de birdo.

Nun mi diferencigis per la orelo ankaŭ laflugsonojn — similajn al ventpuŝoj — de l' anasoj, de laflugilfrapetoj apenaŭ aŭdeblaj de l' galinagoj, aŭ de laflugilakraksvingo de l' junkeja krekso. Mi bone diferencigis ankaŭ la kriojn de l' agloj rabeme krozantaj en la ĉielalto, de la trumpeta bruoj de l' ardeoj, de la fortesona, mallonga gagado de la bluetaj anseroj. Kaj dum la tuta tempo de mia restado en la boato, kun la malvarma pafilo en la mano, mi estis kun okuloj larĝe malfermitaj embuskante, kun koro preta fajre frapegi, sen speciala sento, sen iu penso.

Mareno donis al mi klarigojn pri tiu ĉi pasia ĉaso, mildvoĉe, per duonvortoj, laŭ lia kutimo. En longaj intertempoj de silento li laŭte sorbfumis la pipon ĉiam plenan. Kiam ĝi sentabakiĝis, li denove plenigis ĝin, sed antaŭ la ekbruligo li plibonigis sian buŝguston per unu—du glutoj da brando.

Iom post iom, kvankam malfacile, ni interamikiĝis, kaj mi eksciis ion el la pasinto tiel forte ĉagreniginta lian animon.

La malnova nobelo, „tiu formortinta“, nobelo Leonido, kiel lin nomis Mareno, faris kapricaĵojn dum lia tuta vivdaŭro. Li mastrumis la homojn nur per kriego kaj piktuŝo de la vipo. Kaj li ĉiujn silentigis kaj turmentis, kvazaŭ sklavojn. Kaj de tiu maljunulo devenis tiu ĉi senripoza metio de pafisto kaj fiŝisto, pri kiu li neniam ĝojis, sed kiu fine eniĝis en lian sangon, kun la miasmoj, febroj, haladzoj de l' marĉo. Kaj de la maljunulo devenis ankaŭ la dolorego de lia junaĝo, — pri kiu li nenion diris al mi klare, sed kiun mi tamen preskaŭ komprenis, ĉar en tiu doloro temis ankaŭ pri la edzino

de l' pafisto, tiam mortinta, tiel foririnta, „pro senfina korĉagreno“.

Kaj nuntempe, kun tiu ĉi juna mastro la ĉasisto nenion havis klare. Almenaŭ al mi li nenion volis diri. Kaj mi ne komprenis, kion li povis havi, kiam „lia nobelo“ eĉ ne restadis sur la bieno; li venis nur tiel, aŭtune, por unu—du monatoj.

„Kion vi havas kun li, Oĉjo Maren'? . . .“

„Mi? kun li? nenion! Kiam li venas, mi portas al li ĉasaĵon kaj fiŝojn, — jen. Kaj pro tio li permesas, ke mi nutru min el la marĉo dum tuta jaro, ĉar nur tiom restis al mi: la pafilo kaj la dometo . . .“

Li rigardis min lace, kun malluma vizaĝo, per verdaj okuloj rondaj, kaj li kapbalancis.

Foje li diris al mi mallonge:

„Vi ankaŭ timus kiel mi . . .“

„Kial mi timu?“ Vi diras, „ke vi nenion havas kun li.“

„Sed kion mi ja havis kun la alia? Li havis! . . . Mi nenion havis!“

„Ej! . . .“

„Kio: ej? Nenio. Tiom!“

Nur el tiom mi nenion povis kompreni. La viro havis animon tro fermitan, kun ŝtoniĝinta koro, kun malamo malnova, kaŝita, ne mildiĝinta. Kaj kvankam mi bone kondukis kontraŭ li, iom el lia ĉagreno, kvazaŭ ankaŭ min tuŝis; li rigardis min, kiel li rigardis la ĉasaĵon, per okuloj iufoje ekbrilantaj; kelkfoje li ne respondis al miaj demandoj. Lia tuta seka estaĵo, kun la hirta barbo, kun la okuloj profundaj, nekompreneblaj, kiel la akvo de Jezer, estis plena de nefidemo, malsimpatio kontraŭ la nobela mastro, kiu lin lasis nur kun la pafilo kaj la dometo, kaj kiu faris grandan malbonon al li, iam, eble dum lia junaĝo.



Kaj kiel ajn: ankaŭ mi estis nobelo-mastro. Kiel ajn li regis sin, — io akra, io malkontenta penetris el lia parolo, io konfuza por mi, — kaj kun stranga timemo mi rigardis la nigrajn manegojn, kun la nodecaj fingroj.

Sed malrapidete forpasis tio ĉi. Kaj li, iom post iom, forgesis la nobelon. Mi ekestis kamarado por li, unue estante lia lernanto, kaj li ŝajnis iom plimildiĝi al mi, kiam, fine de l' semajno, mi ŝovis en liajn timigajn manplatojn du monpecojn po kvin leoj.

Liaj okuloj fajreris en dubeverda fulmo. Poste li rigardis min kontente, kun rideto:

„Vivu, nobelo, donu al vi sanon Disinjoro ... Tio ĉi ne estas por mi ...“

„Do por kiu? ...“

Subite li levis siajn okulojn kaj rigardis min. Poste li malrapide mallevis la palpebrojn, kun la pupiloj al la kapo de l' pipo, kaj ne respondis al mi. Li volis tamen pruvi al mi, ke mi tuŝis lian koron, ke li estas rekonema al mi. Li komencis murmureti kaj li tuis kelkfoje.

„Ĉu vi scias ion, moŝto Niĉjo? Vi neniam venis matene en la marĉon ...“

„Ne.“

„Ej, tiam vi nenion scias. Matene ĉio troviĝas ... Mi precipe matene sukcesas, kaj ĉasante, kaj fiŝante. Ankaŭ vespere troviĝetas, mi ne diras, — sed ne tre! Ĉu vi havas tempon matene!“

„Mi havas, Oĉjo Maren', kial ne? ...“

„Ej, tiam venu dum mateno. Morgaŭ, se vi volas. Ke mi promenigu vin surakve ... Ho! karulo-karuleto, kiaj belaĵoj estas videblaj matene! ...“

Kaj li gratis sian kapon, kun la pipo en la buŝangulo, kun rigardoj varmiĝintaj dum momento.

Min timtremigis la maltrankvilo, senpacienco, promeso

pri ĉaso, kian mi ankoraŭ ne estis vidinta, — miaj okuloj brilis pro ĝojo.

„Do morgaŭ, mi venos morgaŭ certe!“

„Venu, moŝto, ĉar vi ne bedaŭros! ...“

Kaj li denove ekremis pli vigle, boatportante min tra la kana kaj junka arbetejo, al la bordo.

La somera vespero volvis sian vualan misteron super Jezer. La granda ferponto, malproksime, ŝajnis longa rubando blanka, etendita sub la blua ĉielo. Funde, post ni, altiĝadis la malpezaj vaporoj malviglaj de la staranta akvo. Vento apenaŭ sentebla alportis la akrajn, varmajn miasmojn de la ŝlimejo kaj putraj arbetejoj.

La viro remis streĉante sian nukon; li kraĉis en siajn manplatojn, trene pluenboatis, tirkaptante arbitajn nodojn, dum la akvo plaŭdetis, poste ĝi restis post ni tremanta en rondetoj.

Mi eksaltis:

„Moŝto, ne koleru ... Mi estas tia, malsaĝulo ... Mi ja ne lernis en lernejo! ...“

„Kial mi koleru, Oĉjo Mareno?“

„Do vidu, mi ne povas tiel paroli, multe kaj detale ... Mi pli multe silentas, mi estas neparolema ... Ve al mia animo ... Kiom mi suferis, nur la supra Disinjoro scias!“

„Bone, Oĉjo Maren', pro tio mi ne koleras. Kial mi koleru?“

„Ne, sed vidu, ke vi ne kredu ... Tiu ... Sando estas tro parolema ...“

Subite li haltis, forte enkraĉis en la manplatojn kaj nenion plu diris. Li remis pli streĉe. Kvazaŭ li estus bedaŭrinta ankaŭ tion, kion li diris. Kaj mi pensis pri senkateniĝo de l' suferoj, okazinta iam, ĉe la maljuna nobelo, „tiu mortinta“.

Mi vekigis kun la nokto surkape; iom post noktomezo. Dragomiro — de kiam mi ekvagadis, li zorgis pri mi, kiel pri siaj okuloj — jam vespere estis doninta ordonon kaj la ĉevalo estis preta ĉe la ŝtuparo. Kiam ĝi flar-sentis min, tra la mallumo, ĝi plaĉe bleketis kaj altuŝis per sia malseka nazo mian etenditan manon.

La stalisto streĉis la rimenon. Mi palpis mian tornistron, ekprovis la mekanismon de l' pafilo kaj mi saltis en la selon.

La nokto estis varma. Egaj nubmakuloj kovris la stelaron. La stepo silentis, disvolvita kiel ŝtoniĝinta maro en la nekonato de la malproksimo. Nek homa voĉo, nek koka krio, nenio; la ombro antaŭ mi formis muron, kiu sin retiradis samtempe kun la antaŭeniĝo de la ĉevalo rapide trotanta.

Mi estis malpacienca, sprone pelis la kurulon. La nuboj sur la firmamento ariĝis, formanĝis la lazuron, kiam la milda bloveto de la marĉo komencis karesi miajn vangojn, mi sentis guton da pluvo sur la vizaĝo.

„Pluvos! mi pensis. Mi vane venis!“ Kaj bedaŭrego nebulis mian animon, kvazaŭ mi estus suferinta gravan perdon.

Mi rapidigis la paŝon de l' ĉevalo tra la profunda mallumo. La vilaĝo kun senmova dometaro ŝpruce aperis apud mi. Rande, ĉe la akvo, la drinkejo de Sando eĉ radion da lumo ne vidigis.

Multaj pensoj naskiĝis en mi.

Kion mi faru kun la ĉevalo? Kie mi lokigu ĝin? Antaŭan vesperon, antaŭ mia ekiro al Sărățeni, mi priparolis kun Mareno, la ĉasisto, ke mi venos sekvontan tagon antaŭ krepusko, por ke ni havu tempon eniri la salikejojn, sed mi forgesis diri al Sando, ke li atendu

min, por enstaligi mian ĉevalon. Nun kio estis farota? Ĝis kiam li vekigōs je mia kriado, ĝis kiam li vestos sin, ĝis kiam li elvenos, — pasos la tempo. Kaj la ĉasisto, vidante la pluvon, opinios, ke mi ne venos, kaj li foriros ien. Sed se la pluvetado ĉesos ĝis matenkrepusko? — Tial, mi rapidu tiel, kune kun la ĉevalo, ĝis la marĉo. Mi devas trovi Marenon. Ni vidu.

Kaj mi rapide ekiris al la loko, kie mi sciis, ke la boato estas ligfiksita. La orienta horizonto, al la Danubo, estis fermita kvazaŭ per muro de mallumo. De supre la pluvakvo falis ĉiam pli densa, gutanta, varma.

Mi trovis la lokon de l' boato; sed la boato mankis. Kelkaj pecoj da krusto kunĵetitaj sur la malsekan bordon, bruletadis, eble vespere ekbruligitaj, de Mareno, por atentigi min de malproksime pri la loko. Sed kial mankis la boato? Ĉu venis la pafisto? Ĉu li forremis en la marĉon? Neeble, li devis atendi min. Eble li ne venis ankoraŭ.

Por juna kaj pasia ĉasisto, kia mi, tiuj ĉi aferetoj, neniaĵoj, havis grandan signifon. Plezuro de l' junaĝo, kiom ajn eta, multajn ĉagrenojn kaŭzas al oni. Mi haltadis, kalkuladis ĉiamaniere, kaj dume la densa pluvo malsekigis miajn vangojn kaj manojn.

Mi turnis la pafilon kun la tuboj malsupren kaj atendis. La krustopecoj bruletadis malrapide, sufokite, sen flamo; de temp' al tempo ili kraketis kaj ŝprucis grizeblankajn radiojn de brila fumo. Mi volvis cigaredon, ekbruligis ĝin per karbopeceto de malsupre, pli bone envolvis min en la maldikan, someran mantelon, mi apogis min al la selo kaj atendadis enpensiginte. Sed la nokto daŭris longe, — la vilaĝo post mi, la senlima Jezer antaŭ mi, ambaŭ kuŝis en morta silento. La mallaŭta tremsono de l' pluvo en la arbetejoj apenaŭ-apenaŭ penetretis ĝis

miaj oreloj, kaj mi ne sciis kion fari, kun la samaj infanecaj demandoj kaj supozoj.

Returniĝinte, jen mi rimarkis lumon brilantan surborde. Ĝi tremetadis, kvazaŭ ruĝa stelo. Tie estas la domo de Mareno, mi estus devinta pli frue pensi pri tio. Nun kion mi povas fari, dum tiu ĉi pluvo? Mi iros al li, kaj mi demandos, kion mi faru!

Mi prenis la kondukilon per la maldekstra mano kaj ekiris malrapide, glitante sur la ŝlima bordo, al la dometo de la ĉasisto.

Ĝi ne ŝajnis malproksima de la fajro, — sed mi iradis longan tempon. Ĉirkaŭ mi kvazaŭ maldensiĝis la dika nebulo de l' nokto.

Mi alvenis. Malalta dometo, kovrita de junkaĵo, apenaŭ rimarkebla en la malhelo. La lumo eliĝis tra sola fenestreto, malgranda kiel manplato. Malplena, pura korteto. Dorse bretbarilo, kortbirdejo, ĝardeneto, supozitaj, sed ne videblaj.

Mi kriis: „Oĉjo Maren'! . . .“ kaj atendis iom da tempo. Neniu aperis.

Mi pli alproksimiĝis, kun la ĉevalo post mi.

„Oĉjo Maren'! . . .“

Iu ektiris la seruron de l' pordo. Mi preparis min por diri ion pri pluvo, pri ĉaso, — sed mi restis samloke, kun buŝo larĝe malfermita. Antaŭ mi, je du paŝoj, ĉe la pordo, kun petrola lampeto en la mano, staris knabino, knabino proksimume dudekjara. Ŝi levis la lumigilon super la kapon kaj provis malkovri en la malhelo la kriinton.

„Kiu estas tie? Paĉjo ne estas hejme. . .“

Poste ŝi haltis. Ŝi vidis min bone kaj volis sin retiri, timigita de io. Mi rapide faris unu paŝon antaŭen.

„Ĉu Oĉjo Maren' ne estas hejme?“

„Ne. Ĉu vi estas la nobelo el Sărățeni? . . .“

Mi kapjesis kaj pensis, kion mi povus diri al ŝi. Ŝi mallevis la lampeton ĝis la brusto, kaj la flamo malkovris al mi vizaĝon puran, brunan, karbonigre brovarkitan, kun du okuloj mirindaj. Nun tiuj okuloj ridetis. Kaj mi sentis min subite trapenetrita de stranga timtremo, tie, sur la bordo de Jezer, en la nokto min ĉirkaŭvolvinta, en la pluvo, kiu apenaŭ aŭdeble torentetis ĉirkaŭ mi, en tiu forlasita vastejo, kontraŭ knabino sorĉaperinta, — knabino kvazaŭ ĵus eliĝinta el la tero, kun lumigilo en la mano, kun du okuloj tiel bele brovarkitaj. Io varma plenigis mian brustokorbon, poste la varmo supreniĝis en la vizaĝon kaj en la okulojn. Aro da kuraĝegaj vortoj ŝoviĝis svarme sur miajn lipojn. La tuta juneco ekflamigita de subita enamiĝo, fulme aperinta en mallumo, el la nekonato, min pelis kvazaŭ onduŝo al la knabino, kiu staris antaŭ mi kaj ridetis.

Ŝi rapide parolis, subite malsuprenigante siajn palpebrojn.

„Paĉjo foriris en Jezero-n. Li vidis, ke pluvos kaj li opiniis, ke vi jam ne venos. . . Nun li foriris por provi iujn korbojn, kiujn li vespere metis al loko abunda je fiŝoj. . .“

Mi ekmiris pri ŝia milda voĉo. Finiĝis! Mi pli decidiĝis momenton post momento, kaj miaj okuloj ardis.

„Mi longe atendis lin apud la fajro kaj mi miris, kial li ne venas. . .“

„Ne, li foriris. . .“

Mi faris ankoraŭ unu paŝon antaŭen. Ŝi retiris sin kun la lampeto. Mi diris rapide:

„Jen mi lasos la ĉevalon iom da tempo ekstere, kaj mi, dume, eniros por sekigi de la pluvo. . . Ĝi penetris ĝis miaj ostoj!“

Ŝi faris lokon kaj mi eniris. Post mi ankaŭ la lumo plenigis la etan lokon, malkovrante la kamenon, kie mortadis la flamoj de kelkaj sekbranĉoj — la purajn murojn, kaj la keston en la fundo, kun la dotajoj altiĝantaj supren, ĝis la trabo. — Kaj la amo, la varmegaj febrotremoj, kiujn mia junaĝo delonge atendis, ĉirkaŭvolvis min, kiel la flamoj de ardŝtiparo. Kulpaj estis ankaŭ la pluvo, ankaŭ la nokto, ankaŭ la timtremiga nekonateco de la loko, kaj ankaŭ la lumo malkovrinta tiome grandajn kaj nigrajn okulojn. . . La knabino en sia blukatuna jupo, blanka ĉemizo kun florbroditaj brakujoj, gracie ĉirkaŭita per mallargâ zono, kombita, kun harplektaĵoj, rigardis min per okuloj mallumaj, profundaj, kaj sen scii, kion ŝi diru. Ŝi metis la lampeton apud la kamenon kaj rigardis min timeme.

Mi denove diris rapide:

„Sed mi ne sciis, ke Oĉjo Mareno havas grandan knabinon. . . Kaj eĉ tian knabinon! . . . Al mi li nenion diris. . .“

Ŝi silentis, kun unu mano ĉe la mentono, kun okuloj direktitaj al la fajro.

„Kiel vi nomiĝas?“

„Kiva!“

Mi pensis: Kion mi diru ankoraŭ?

„Mi parolos kun Oĉjo Mareno, ke li ne plu tenu vin tiel kaŝita. . .“

„Ne, ne!“ respondis ŝi tujtuje; „nenion diru al li!“  
Kaj en ŝia voĉo subite vekigis timtremo.

„Kial?“

„Paĉjo mortigos min, kiam li ekscios, ke mi lasis vin eniri la domon. . .“

„Do kial vi enlasis min? . . .“

Ŝajnas, ke ŝi dubas:

„Se vi diris, ke la pluvo trapenetris vin. . .“

Kaj la grandaj okuloj, direktitaj al mi nur momenteton, ŝajnis bonvole rideti.

„Bone, Kiva, ĉar vi kompatis min, sciu, ke mi aĉetos al vi paron da orelingoj. . .“

Ŝi silentis, poste ridetis.

Sekvis silentopaŭzo. Ekstere koko trumpetis obtuze. La mallumo ĉe la fenestreto malfortiĝis. Stranga varmeco kaptis min; la sango suprenkuris en miajn vangojn. Mi nenian vorton plu povis diri, eĉ ne havis kion diri. — Mi antaŭenpaŝis; la knabino eksaltis. Mi etendis mian dekstran brakon, ekprenis ŝin ĉe la talio, preme ĉirkaŭzonita. Mi sentis, ke ŝi retiriĝas, kun nuko plenforte streĉita. Mi kaptis ŝin ankaŭ per la maldekstra mano. Retirante sian kapon, ŝia vizaĝo subite paliĝis, kiel kalko, la lipoj kunpremitaj estis mutaj, sen vorto. Poste, subite, la dekstra mano, per kiu ŝi puŝis mian bruston, malfortiĝis, falis.

Mi forte ĉirkaŭprenis ŝin, kisis ŝiajn palpebrojn. Ŝi ankoraŭ gardis sian vizaĝon. Kaj mi subite sentis ŝiajn lipojn en fajra arduŝo rapida, — dum ŝiaj okuloj ekbrulis en nigra flamoflagro.

Kaj en ŝia voĉo kvazaŭ doloro estus ekstreminta:

„Nun venos paĉjo. . . Tagiĝas. . . Haltu! jen jam aŭdiĝas lia voĉo. . .“

Ŝi rapide malfermis la pordon. — La marĉejo, ĝis tre malproksime, varmajn vaporojn fumblovis en la malseka, malgaja lumo de l' tago. Iu voĉo kriis, kiu scias, kie, tra la vastaj arbetejoj, — longa, teruriga blekokrio jen profunda, jen alta, tremis tra la pasejoj en la kanaro, sub la salikaj foliarkaĵoj.

La knabino diris milde: „Nun li venas. . .“



Mi aranĝis la bridon de l' ĉevalo, kaj demandis: „Kion li krias? . . . Kion li diras?“

„Nenion. Li nur krias. Mi devas iri por preni la fiŝojn por la manĝaĵo. . .“

La nigraj okuloj fulmpenetras min nur dum momentoj, poste ili rapide kliniĝis malsupren. La vangkusenetoj, antaŭe blankaj, nun ruĝiĝis kiel la floroj de l' pomarbo.

Mi volis ankoraŭ diri ion, kaj denove etendis mian brakon, sed ŝi rapide retiriĝis.

„Mi venos morgaŭ matene!“ diris mi kun tremanta voĉo.

Ŝi ne respondis tuj. Poste ŝi flustris, sen rigardi min: „Morgaŭ ne, — estas dimanĉo; paĉjo restas hejme. . .“

„Do mi venos lunde . . . ankaŭ tiam je la sama horo. . .“

Ŝi silentis. Returnis sin, kaj rapide eniris la domon. Post tio ŝi fermis la pordon, brue fermiĝis la seruron. La lumo estingiĝis. Kaj oriente, tra la ĉifonitaj nubamasoj, fluis la fajrofontoj de l' rozkolora aŭroro, sur la akvon kaj sur la nebulmontojn de la marĉo. Senĉese pluvadis, sed ĉiam pli kaj pli maldense, la brua voĉo en la arbetejoj eksilentis. Kaj en la trankvilo vualanta la solejon, en la malklara grizo de l' matenkrepusko, mi surĉevaliĝis kaj ekrajdis al Sărăţeni, kvazaŭ pelita de io.

#### 4.

Mi ardis pro la ekflaminta amo, la plej unua enamiĝo! Mi tremadis kvazaŭ febroskuita en mia ĉambro, sola, dum ekstere plue pluis. Kaj mi pensis pri ĉiu momento de la tempo, kiam mi staris kontraŭ Kiva, pri ĉiu momento, pri ĉiu rigardo, kaj pri la fajrokiso eĉ nun ardiganta miajn lipojn, kaj bolige, potence penetranta en mian tutan sangon. Nun, malproksime de la knabino, mi pensis, ke mi estus povinta konduiti pli kuraĝe, ol

mi kondukis. Mi sopiris ŝin, ŝiajn okulojn sage pikintajn min en intertempoj, la kison, kies ebrio ankoraŭ regis min. Ŝajnis, ke mi sentas en la fingropintoj la varmecon de l' plena kaj malmola korpo, ŝajnis, ke mi sentas la tutan korpon kun la elasta brusto, — kaj min regis sola penso, sol sola deziro pasia. La plej unua amo! mi konis la amon nur el libroj, nur laŭ parolo. Ankaŭ mi revadis, kiel oni revas, delikatan virgulinon, arbarangulon kaj flortapiŝon, kaj ankaŭ fonton murmuretantan en la mistero de l' vesperiĝo, — flustrojn kaj promesojn, — kaj kiome diferencis miaj imagoj de tiu ĉi malsano rapida, ardiganta kaj dolĉa, kiu min neatendite pelis al la filino de ĉasisto sur la rando de la marĉo, per du vortoj, per unu rigardo! Kaj mi ne plu povis koncentrigi miajn pensojn pri alia afero; pri nenio mi povis pensi. Miaj pensoj disvagadis, poste denove kolektiĝis en sola punkto, — kaj jen, aperis la knabino antaŭ mi, la okuloj duone fermitaj. . .

Mi projektadis, pense parolis pasie. Kaj la tempo fluis malrapide, mallaŭte, kiel la pluveroj mildsone falantaj de la defluilo. Mi intencis surĉevaliĝi, forrajdi; mi pripensis; tio estus frenezaĵo. Kaj mi ne plu povus rakonti, kiel mi pasigis la nokton antaŭ dimanĉo, kiel malsana mi estis la tutan sekvintan tagon, kaj la postan nokton, kies mezo ne plu volis alveni, kiu febre turmentis min ĉiumomente. Vi scias, se vi estas homoj, kio estas tiu ĉi amo renversanta la sentojn kaj malklariganta la menson.

Lunde, antaŭ tagiĝo, mi rajdis en galopo, sur mia Korvo, tra la malhelo de l' senlima kampo, sub klara ĉielo senluna, plena de orlumetoj. Mi rapidege rajdis; la blovo de l' flugo muĝfajfis ĉe miaj oreloj. Ekvidinte Jezero-n en la malproksimo, mi moderigis la flugrajdon.

De malproksime mi pasis ĉirkaŭ la vilaĝo kaj sur la bordo, trotante mi reiris al la dometo, kondukita de la lumo brilanta ankaŭ nun samkiel la unuan fojon.

Korpremite mi pensis, ke eble Mareno ne foriris marĉejon, — kaj tiam kion mi faros? Mi pensis ankaŭ pri tio, ke la knabino nenion respondis al mi, ĉe mia foriro, kaj kio do okazos kun mia animo? Kaj mian kapon trapasis ankoraŭ multaj pensoj, venintaj kaj forlasintaj min per uragana flugo, kvazaŭ birdoj timemaj.

Je pafilpafa distanco mi deĉevaliĝis kaj ekprenis la bridon de l' ĉevalo. Mi alproksimiĝis singarde kaj mia koro forte frapadis en mia brusto.

Mi lasis la ĉevalon sola. Mi alproksimiĝis kaj haltis ĉe la pordo. Mi volis kriegi. Kiun mi voku? Eble la pafisto estas hejme? Kaj mi ja eĉ ne havis voĉon en la gorgo.

Subite mi eksaltis. La voĉo de Kiva demande sonis ĝuste apud mi, post la pordo:

Ĉu vi estas, paĉjo?

Apenaŭ mi povis balbuti:

„Ne, Kiva, mi estas, malfermu. . .“

Nenia respondo. Eble ŝi dubis; eble ŝi pensis, ke ŝi ne enlasos min; kaj mi denove ekparolis petegante:

„Ĉu vi ne rekonas min, Kiva? . . .“

Tiam la seruro grincetis mallonge; kaj aperis antaŭ mi la knabino, kun la malhelaj okuloj brilantaj en lumbrilo falkurinta al la sojlo samtempe kun ŝia apero. Ŝi estis pala, kun dentoj kunpremitaj, kiel en la momento, kiam mi kisis ŝin. Ŝi rigardis min senmove, ankoraŭ ne decidite.

Mi tremis konfuzita. Mi etendis la manojn. Ŝi retiriĝis, fulmrapide, kvazaŭ repuŝita de io. Ŝi mallaŭte ĝemetis:

„Paĉjo rimarkos vin!“ sed tiel mallaŭte, ke apenaŭ estis aŭdeble.

Kaj kiam mi enpaŝis la ĉambreton, ŝi apogis siajn manojn al mia brusto, kaj treme baraktis inter miaj brakoj. Poste ŝi subite trankviliĝis, lasis sin sur mian bruston, ĉirkaŭprenis mian kolon, kaj mi sentis ŝin varma, kun bola spiro kapturniga.

## 5.

Nun granda paco regis mian animon. Reveninte hejmen, mi eliris sur la kampon, por kontroli la konstruadon de la tritikaj garbmontetoj. Mi parolis gaje, kiel neniam, kun Dragomiro, kiu miregis pri tiu ĉi konsidero nekutima de mia flanko. Mi promesis brandon al la kamplaboristoj, kaj longan tempon mi rigardis, kiel vigle ili movis sin inter la oraj garboj, kun forkegoj, brakoj, kun potencaj voĉoj, gajaj ŝercoj.

Komence de posttagmezo, mi ekiris al Jezer, malvigle trotante. Sinjoro Sando, la drinkejestro, atendis min ĉe la sojlo, kun la manoj surtalie, ridetante al mi kun sia kutima amikeco.

„Denove revenis la bona vetero, moŝteto! Kiel vi fartas? Oĉjo Mareno atendas vin . . .“

Kaj la ĉasisto tuj elvenis, brue paŝante en liaj pezaj botoj, explore rigardante min per la verdaj kaj rondaj okuloj. Li ekparolis per sia malalta, laca voĉo:

„Tiam mi ne atendis . . . Estis malbela vetero . . . Mi sciis, ke vi ne venos . . .“

Kaj je lia rigardo subite stranga maltrankvilo volviĝis ĉirkaŭ mi. Mi turnis mian rigardon aliflanken, je la ĉevalo kondukata de Sando al la stalo. Sed la ĉagrenita kaj severa figuro de l' ĉasisto refoje montriĝis al mi:

mi returnis la okulojn, observante lin. Ĉu li nenion suspektas? Ĉu li nenion sentis?

Li nenion konjektis; li eĉ ne havis pro kio suspekti. Li trankvile plenigis per tabako sian pipon, metis ĝin en sian buŝon, kaj rigardis min dumlonge:

„Kion vi havas, moŝto Niĉjo? Ĉu vi ne fartas bone? Kvazaŭ viaj vangoj estus pli malplenaj . . . Ĉu vi estas laca?“

„Jes, mi multe iradis sur la kampo . . .“

Sed mi ne estis laca, kaj mi ne komprenis, kion mi povis havi, — kvankam la pezeco, la nebulo min ĉirkaŭanta, ankoraŭ premis min.

Miaj okuloj senvole fiksiĝis al la grandformaj kaj nodplenaj manoj de l' pafisto. Kaj mi tuj sentis timemon pro tiuj manegoj, kiuj estus povintaj min neniigi dum momento; mi sentis timon pro ili kaj pro la furoro dumlonge fermtenita, kiu estus povinta subite eksplodi kaj direktiĝi ankaŭ kontraŭ min.

Sed tion ĉi mi sentis nur malklare, dum tiuj momentoj, funde de mia animo, kiel bloveton, tremeton.

Poste revenis Sando, la drinkejestro, kun rideto li proponis la brandon, donis la pakajon da tabako, kaj metis la manojn surtalien:

„Sinjoro, mi metis rostigi kokidon, kaj mi faros al vi ankaŭ bonan supon, kun karmo portita de Mareno el Jezer . . . Kvazaŭ en restoracio, je mia honoro, mi diras al vi . . .“ Kaj li etendis la montrofingron, kvazaŭ li volus ĝin doni al mi.

Mi vagadis en la marĉejo tiun vesperon kaj multajn vesperojn sekvintajn. Matene mi ne tre havis tempon. Mareno demandis min:

„Moŝto, kial vi ne venas laŭ nia preparolo: dum iu mateno? . . . Tiam vi vidos ĉasaĵon!“

„Do vidu, Oĉjo Maren', mi venos . . . Sed morgaŭ matene mi ne tre havos tempon . . .“

Mi rigardis flanken, kun premita animo kaj mi tuj poste aldonis firme:

„Ne. Morgaŭ mi havos multajn aferojn, mi ne povos veni . . .“

Je la malvarmetaj matenkrepuskoj, ĉiumatene, korvo min portis ventfluge al Jezer. Se la lumo estis estingita en la surborda dometo, mi returnis min malrapide, mediteme, kun peza koro; se la lampeto estis ekbruligita, ĝi verŝpenetris en mian animon kiel feliĉondo. Mi venadis malrapide, piede, kun la ĉevalo post mi, kun la brido ĉirkaŭ la maldekstra brako, kaj la mola, timema voĉo demandis, kiel ĉiam, de proksime, post la pinarba pordo:

„Ĉu vi estas, paĉjo?“

Kaj mia koro forte frapadis en la brusto, kiel vundita birdo.

Poste nia juneco ne povis resti pacienca dum la matenoj, kiam la lampeto devis resti estingita.

Al kavaĵo, ĉe surborda kaŝejo, en herbaron elkreskintan sur la tero, kiu amasiĝis en la junka kaj kana teksaĵo, venis tremante Kiva, kun fiksaj okulegoj, kun oreloj atentaj pri la plej eta bruoj de la ĉirkaŭaĵo. Ŝi tremis, mallaŭte ĝemsopiris, kiam mi ĉirkaŭbrakis ŝin, kaj preme sin gluis al mi. Tamen ŝiaj vangoj plurfoje estis kalko-blankaj kaj tremantaj froste.

Mi demandis ŝin mallaŭte: „Kion vi havas, Kiva? . . .“

Kaj ŝi apenaŭ povis respondi al mi: „Ah, se paĉjo eksciis . . . estus ve al mi! Mi tre timas lian furoron . . .“

Kaj ŝian timemon ankaŭ mi sentis, pli malproksime, pli malforte, kiel maltrankvilon antaŭ la nekonato.

Sed la knabinon mi amegis per la tuta fajro de miaj

dudekdu jaroj. Ne plu interesis min la bienaj aferoj, nek la aliaj aferoj de mia patro, mi ne plu legis eĉ la leterojn venintajn de Bukureŝto; mi estis kvazaŭ en bela sonĝo, el kiu mi ne plu volis vekigi.

Dragomiro ĝoje movetadis sian longan liphararon, li lasis min kun miaj sopiroj, gaje akceptis min, per ruzaj okuloj akompanis min, kiam mi foriris, — kaj li faris siajn aferojn. Sed kion li povis fari, kiam mi forestis, ne plu interesis min. Mi volis, ke la tuta mondo lasu min en paco, ion alian mi ne bezonis.

Kaj ŝajnis, ke la knabino nenion havas en sia vivo, krom la horoj de amflustrado. Timeme ŝi venis, aŭ atendis min, kun timo ŝi adiaŭis min. Nun ŝiaj vangoj estis malplenaj, ŝiaj okuloj brilis, kvazaŭ pro kaŝita sufero; ŝi ofte rigardis al mi honteme, humile, kaj la timo pro la furoro de l' pafisto ofte eliĝis el ŝia estaĵo, en vortoj flustritaj kun grandaj okuloj, kaj tiam ŝajnis, ke super nia amo pasas glacia blovo.

Ŝi estis simpla knabino, ŝi ne povis diri belajn vortojn, sed ŝia akra sentemo strange komprenigis al ŝi la aferojn. Ŝi bone komprenis, ke ŝi faris eraron, ke la juna nobelo amanta ŝin, devis nur trapasi ŝian vivon, — sed kion ŝi povis fari? Io pli forta, ol la timemo, kaj klara kono de l' eraro, la fajro de l' junaĝo, kure penetris tra ŝia tuta estaĵo, kaj kun fermitaj okuloj ŝi lasis sin kvazaŭ en abismon. Ankaŭ por mi estis tre surprizaj ŝiaj mal-lumaj vortŝiraĵoj timemaj, per kiuj ŝi diris al mi ĉion ĉi, kaj komprenigis al mi, ke ŝi nenion atendis de mi.

Foje, matenkrepuske, en la kaŝejo de l' kana kaj verdaĵa arbetejo, ŝi diris al mi kun ekscitita voĉo:

„Paĉjo povos eĉ malkovri ĉion, — mi ne tre timos . . . Mi diros al li tiam, ke alimaniere ne povis . . .“

„Kiam tiam?“

„Kiam li malkovros . . . Mi tro timas, sed eble tiam mi ne plu timos . . . Li piedpremis ankaŭ panjon per la bota kalkanumo . . . kaj ankaŭ mi kriploris, kvazaŭ li estus volinta ankaŭ min mortigi, tiome furioza li estis . . . Sed li ne mortigis panjon, — ŝi mortis pli poste, pro korĉagreno . . . Mi estis tiam treege eta, sed mi memoras . . .“

„Kaj kial, Kiva? kio okazis?“

„Mi komprenis ĉion“, respondis la knabino, rigardante min kun timema rideto. „Panjo vivis kune kun la maljuna nobelo . . . Kaj paĉjo kriis, ke li mortigos ankaŭ min, ĉar mi ne estas lia infano, ke mi estas malpura, kaj li ĵetos min al la hundoj . . . Mi komprenis ĉion. Kaj poste panjo mortis! . . .“

Mi rigardis ŝin maltrankvile. Nun mi komprenis ankaŭ la mallumon en la animo de la pafisto kaj eble ankaŭ la nekutiman sentemon de Kiva. Sed la aeron de mia junaĝo mi vidis ankoraŭ neklare; mi eĉ ne povis kompreni ĝin; tamen kruelaj aĵoj de longe nebulitaj, sendis al mi dolorbloveton el la tombejo de l' pasinto.

Kaj Kiva, apude, meditadis kun nigraj okuloj, grandaj, senmovaj. Subite ŝi ekparolis molvoĉe:

„Ankaŭ panjo pekis kun la malnova posedanto de la bieno . . . Nun, ŝajnas, ke estas malbeno! . . .“

Ŝi ekridis, turnante al mi sian vizaĝon:

„Lasu, Niĉjo, nenio; eble neniu ekscios!“

Kaj ŝi fermis siajn okulojn, klinante sin al mi, por ke mi kisu ŝin . . .

Timtreme, ebria pro amo, mi ekrajdis al Sārāṭeni, tra la malcerta lumo krepuska. Kaj en mia kapo tuĵ aperis, en sonĝlumo, la patrino de Kiva, kiel ombro, kaj la fantomo de la maljuna nobelo. — Estis tiam, antaŭ longe, amo eble simila al la mia, kaj la nobelo ruinigis du



vivojn, sen la riproĉo de l' konscienco, eble sen pripenso. Kaj nun, eble, ankaŭ mi ruinigis unu vivon, la vivon de la filino de Mareno, eble de la filino de l' aliaj du, kiuj ne plu vivas . . . Kio povos esti? Kio povos okazi?

Mi ankoraŭ ne imagis la finon de mia amo. Ĉiuj amtagoj de l' pasinto plenigis mian animon kiel lumo; ĉiu momento revenis kun sia senlima feliĉo, promesante estontecon, kiu devis daŭri senfine, — kiel senfina mi imagis, ke estos la flamo de mia junaĝo. Sed mi saltvekiĝis, kvazaŭ el songo: antaŭ miaj okuloj aperis la bildo de l' ĉasisto, ĉagrenplena kaj severa . . .

Antaŭ mi, ĝis nemezurebla malproksimo, en nebulkurtenoj, etendiĝis Baragan, rekte, sen altaĵeto, sen arbo. Mi rajdis sola sub senranda ĉielo, kun la amo kaj maltrankvilo; malforta blovo karesis kaj ventumis mian vizagŝon.

Fervojista dometo, ie malproksime, signosonoris dufoje, malgaje, longdaŭre en la senfino. Kaj la unuaj radioj de l' sunleviĝo ekfulmis al la nebuloj de la malproksimo.

## 6.

Mia amo daŭris proksimume ĝis la komenco de aŭtuno. Mi venadis al Jezer, antaŭ la matenkrepuskoj, kaŝe kiel ŝtelisto, de malproksime mi ĉirkaŭiris la vilaĝon, alligis la ĉevalon ĉe la rando de l' arbetejoj, kaj kun koro frapeganta, kiel ĉiam, mi iris al la konata kaŝejo. Sur la vasta marĉolago regis paco, nur de tempo al tempo pasis supre flugilfrapo, aŭ mallonga pepokrio en soleco. Kiva atendis min en sia katuna jupo, en ŝuoj kun altaj kalkanumoj, kun hararo zorge glatigita per kombilo, kun kronforma harplektaĵo, kun profundaj okuloj brilantaj. Kiam mi alproksimiĝis al ŝi, la rideto lumigis ŝian vi-

zaĝon, kaj ŝi etendis al mi ambaŭ manojn kun la manplatoj kontraŭ mi, kvazaŭ por defendo.

Neniu konjektis ion. La lokoj, kiujn mia ĉevalo trapasis, estis sen vilaĝoj, sen homoj, — kaj neniu povis rimarki miajn venojn kaj forirojn.

Antaŭ vespero mi alvenis sur la kutima vojo, kaj mi senzorge haltripozis ĉe la drinkejo de Sando. La ekskaporalo senprokraste aperis salte kun la glasetoj da brando, kaj kun la tabako por Oĉjo Mareno, li parolis al mi pri la plej diversaj aferoj, kaj ridetis al mi, kiel malnova amiko. La ĉasisto neniam mankis; lia animo iom degelis kontraŭ mi; ĝis la marĉo kaj salikejoj li ĉiam diradis ion al mi kaj demandis min, kio okazas en tiu ĉi granda mondo. Sed alveninte en la embuskejon, ni ambaŭ silentis, kun okuloj fiksjaj, kun oreloj atentaj pri la plej eta bruoj, kun la fingroj sur la pafirilo. Nun mi komencis forgesi, ke li estas la patro de Kiva. Mi neniam vidis ilin kune, mi ne aŭdis iliajn voĉojn miksitaj.

Sed jen, ke iun tagon, post kiam mi deĉevaliĝis kaj eniris la drinkejon, Sando signifoplene ridetis al mi: kvazaŭ li estus volinta diri al mi ion misteran, aŭ demandi de mi iun eksterordinaraĵon, kaj li ne kuraĝus. Mareno, sur lia kutima loko, malŝtopis la tubon de l' pipo. Li deziris al mi bon'-tagon kun sia mallaŭta voĉo, kaj zorgis pri sia afero. Nenio povis min maltrankviligi. Sed sinjoro Sando Popescu volis ion diri al mi, kaj li ne povis. Tamen, kiam mi ekiris al la marĉo, li okulsignis al mi pri la pafisto.

Mi havis diversajn pensojn. Eble li rimarkis min, aŭ iu alia, kaj li atentigas, ke mi gardu min, aŭ eble ĝuste la ĉasisto komencis konjekti. Malpeza maltrankvilo naĝis sur mia animo, kaj mi priatentis ĉiujn movojn de Mareno.

Nenio stranga. Li malligis la paliseton, kiel ĉiam,

trankvile remadis, milde ŝtelveturigis min tra la kanaraj pasejoj, kaj mallaŭte kaŝpasigis la boaton sub la salikarkajoj. Nurnure ke pli malmulte li parolis al mi, ol kutime; sed tio ĉi ne okazis nur nun.

Ĉe la reveno, en la drinkejo, Sando denove maltrankvila, li denove kvazaŭ ne kuraĝis. Fine, post la foriro de Mareno, kiam mi estis sursidonta Korvon, li venis al mi kaj iom altuŝis mian ŝultron:

„Moŝto Niĉjo . . .“

„Kio estas, Sando?“

Li ridetante rigardis min.

„Vidu, kio estas, sinjoro: hodiaŭ frumatene vi pasis kun la ĉevalo preter la rando de l' vilaĝo al la marĉejo, ĉu ne vere? . . .“

„Sed kio okazis?“

„Nenio . . . Mi demandas. Iu homo diris tie ĉi, en la drinkejo, ke li vidis vin . . . Sed mi scias, ke ĉi matene vi ne estis kun Oĉjo Mareno en la marĉo . . .“

„Ne, mi ne estis.“

„Sed vi pasis surĉevale.“

„Se mi nenian aferon havis en tiu ĉi loko, kial mi pasu surĉevale?“

„Memkompreneble, ankaŭ mi tion diris al Oĉjo Mareno, ĉar li demandis la kampanon, ĉu li bone vidis vin . . .“

„Li demandis, ĉu li bone vidis min? Ne, mi matene havas aliajn aferojn; mi ne havas tempon eĉ por veni al ĉasado . . .“

„Ankaŭ mi tion diris . . . Sed Oĉjo Mareno insiste demandadis la kampanon . . . Tiam la homo diris, ke li ne povas scii, kaj ŝajnis al li . . .“

„Bone, kial li demandis? Ĉu li ne sciis, ke mi ne estis? . . .“

Mi rimarkis, ke mi tro facilanime respondis. Pli bone mi

estus devinta rapide finigi tiun ĉi babiladon sensencan. Sando konstante ridetante rigardis en miajn okulojn. Nun mi silentis.

„Do jen, sinjoro, mi nur volis scii . . . Tiom. . .“ Kaj liaj ruzaj okuloj kvazaŭ atendis iun konfesion. Mi rapide surĉevaliĝis kaj ekspronis la ĉevalon. Poste, survoje, maltrankvile mi observis, en penso, ĉiujn movojn kaj rigardojn de l' pafisto. Pli poste mi pensis pri Kiva, pri la amaj matenkrepuskoj, kiujn mi denove apenaŭ atendis; kaj refoje aperis en mia kapo la figuro de Oĉjo Mareno. . . En mi vekigis aro da diversaj pensoj, tamen ili ne povis igi min decidi kaj ne povis malhelpi mian viziton en sekvinta nokto al Jezer.

Mi iris ankaŭ postan tagon, kiel ĉiam, kun iom da maltrankvilo kaj kun zorgeto, farante pli grandan ĉirkaŭvojon. Kaj Kiva atendis kun brilaj okuloj, varme, frostotreme, ĝeme sopirante, kvazaŭ pro doloro, kiam mi premis ŝin en miajn brakojn. . . La maltrankvilo foriĝis kiel fumo.

Sed trian tagon, kiam Korvo pasis sur la kutima vojo, apud la kanoj, ĝi komencis rektigi siajn orelojn. Mi haltigis ĝin kaj deĉevaliĝis, kun la mano sur la pafilo. Kaj tra la mallumo kovranta la lokon, tra laktokoloraj vaporoj de l' marĉo, subite mi sentis Kivan apud mi. Ŝi preme ĉirkaŭbrakis min, gluis siajn lipojn al mia buŝo, — kaj mi ekstremis pro ŝia varmega kiso, kvazaŭ trapenetrita de fajrosago, kiel en la unua momento de mia amo.

Ŝi diris al mi mallaŭte, metante siajn manojn sur miajn ŝultrojn:

„Haltu, ne daŭrigu vian vojon; reiru. . . Ankaŭ mi alrapidis nur por ke mi avertu vin. . .“

Mi restis mute rigida. Ŝi rigardis min en la mallumo per brilaj okuloj; ŝi ŝajnis rideti, ŝia arda spiro brultuŝis mian vizaĝon.

„Kio okazis, Kiva?“

„Mi ne scias. . . Hieraŭ paĉjo silentis dum la tuta tago kaj observadis min per siaj okuloj. . . Poste, kiam vespere mi preparis la manĝaĵon, li diris neatendite: Kial vi malgrasiĝis tiel? kial estas malplenaj viaj vangoj? Kion vi havas? — Nenion, paĉjo, kion mi havu? — Kaj mia sango suprenkuris en mian vizaĝon. . . Tiam li blekokriis al mi: Ĉu tio ĉi estas manĝaĵo, aŭ kio? Kaj li vango-frapis min, pugnobatis mian bruston. . . Mi kuŝis surterigita. . . Kaj mi komprenis, ke li eble eksciis ion. . .“

„Ne, Kiva, ne timu. . . Kion li povis ekscii? . . .“

Mi parolis firme, sed de interne tremo altiĝis en mian voĉon. La knabino ekploris, klinante sian frunton sur mian bruston.

„Ho, se li ekscios, se li ekscios, — li frakasos per la boto ankaŭ min, kiel panjon. . . Li rigardis min kun brovoj tiritaj malsupren ĝis la pupiloj. Se li ekscios, li mortigos min, li ĵetos min en Jezeron, Niĉjo. . . Ho! vi ne konas paĉjon, sed mi jes, mi vidis! . . .“

Ŝiaj larmgutoj ardigis miajn manojn.

Ŝi volis ankoraŭ diri ion; jen mi sentis, ke ŝi ekskuis kaj rektigis sin. Ŝi ĉirkaŭprenis min ĉe la kapo, rapide kisis dufoje miajn okulojn, kun ŝia dolora ĝemeto ama, delasis min kaj forviŝiĝis en la nebulo fontanta en dubebblankaj ondoj el la rando de la marĉo.

Mi sentis mian animon peza, plena de profunda konfuzo. Kaj demando, kvazaŭ skribita per sango, pentriĝis antaŭ miajn okulojn: „Ĉu vere? Ĉu li suspektas? Ĉu li eksciis?“ Kaj per la malpeza vento krepuska venis al mi brueto de paŝoj kaj voĉoj. — Sed eble tio estis nura ŝajno. — De interne io puŝis mian koron, poste premis ĝin, varmege. Svenante mi metis mian piedon en la piedingon kaj mi ekrajdis.

## 7.

Malsana deziro por ekscii turmentis min tutan tagon, kaj venigis min rekte, malgraŭ la korprenio, al la drinkejo de Sando, kaj poste al la boato atendanta, kiel ĉiam.

Mi observadis per miaj okuloj la drinkejestron, mi observadis la pafiston: — ne, kvazaŭ nenio estus okazinta. Mi pripensadis. Iom da tempo mi ne plu venos matene; — kaj la aferoj kvietigis, se ekzistas ia suspekto. Scii, ne estis eble ke sciu la ĉasisto. Li ne havis de kie ekscii. Kaj fine li estis ja sufiĉe trankvila.

Jen, li: kun la pipo en la buŝangulo, li malligas la ŝnurnodon, surmetas la remilojn, kaj zorgeme lokigas la pafilon al la beko de l' boato. Li rigardas min dum momento, por vidi, ĉu mi sidas bone, kaj li enigis la remilon en la kotan akvon. Ni pene ekiras. Poste ni malrapide enveturas la junkejon, post tio la pasejon tra la kanaro.

Hodiaŭ ni malfruiĝis iom. La suno subiras ĉe masego da bluaj nuboj malgajaj. Inter la kanoj, sur la akvostrioj, ruĝetaj briloj tremetadas. Rapidfluga aro da sovaĝaj anasoj muĝe tranĉas la aeron super ni.

„Ĉu hodiaŭ ni ne malfruiĝos, Oĉjo Mareno?“

„Kial do? ni ne malfruiĝos! . . .“

Kaj ni pluveturas iom post iom, ĉiam pli funden, en Jezeron. Longa trembruo, miloj da vekitaj voĉoj de la marĉa loĝantaro, malproksimen frostotremigis la arbetojn, kvazaŭ antaŭ malbona vetero. Kaj ĉe la sunsubira parto, sur la ĉielduono malheligita de nubomonto, jen montriĝis rompita brodaĵo ora, malrekta, sur la tuta rando de l' malhela maso. Kvazaŭ ŝirita fulmo estus rigidiĝinta sur la ĉielo, kiel minaco.

„Malbona vetero estos, Oĉjo Maren'! . . .“

La pafisto ne returnis sian kapon; li streĉe remis, kaj el lia pipo altiĝis fumvualo.

Okcidente la nuboj subite rompiĝis kaj super Jezer, tra la fendoj, ekŝprucis la sangaj fontoj de la flama sunsubiro. La senmova marĉlago ŝajnis sango, ĝis la nigra, malproksima ombro de la salikaro.

La boato faris grandan ĉirkaŭvojon tra la flamkolora akvo. Poste, iom post iom, la lumo malpliiĝis, dume la remiloj sonigadis la ondojn. En okcidento la nuboj fermiĝis; la ombroj rapide etendiĝis, kaj la trembructo de l' arbitaĵo eksilentis. Soleca ardeo pasis, kun malofta flugilfrapo, malproksime. De tempo al tempo ĝi kriis tirsone, kun trumpeta voĉo.

Kaj la boato jen ŝoviĝis ĉe la rando de l' arbetejoj, jen enpasis la kanaron, kiu ŝajnis susuradi kun vivantaj flustroj, atingante sin, post milda klino. La nebuleto de Jezer, kiel varma spiro de vivaĵo, malrapide ĉirkaŭvualis nin kaj la malhelo pliiĝis; kvazaŭ tra okulhararo mi rigardus la ĉirkaŭaĵon.

„Oĉjo Mareno, kie ni haltos? Estus bone tie ĉi, dekstre, sub la salikoj. . .“

Ŝajnis, ke la pafisto ekmoviĝis, sed li ne turnis sin. Lia pipo ne plu fumis. La remiloj pli forte batis la akvon.

„Ĉu ni veturos en alian direkton?“

Li silentas. Kaj jen mi sentas la malnovan maltrankvilon, frostotremiganta min de la profundo de mia estaĵo ĝis la subite kunpremita, varmiĝinta koro. Kaj fulmo-brile mi pensas pri la matena averto de Kiva kaj poste pri la impreso, kiun mi havis, aŭdante malklaran bruon. Kaj mi volas leviĝi, mi volas demandi, mia koro ekfrapegas, — kiam, neatendite, la boato enveturinta la arbitaĵon haltas en kava loko.

Mareno altiĝas, kaj, unue reenpuŝita, ankaŭ mi lev-

iĝas kaj paŝas sur la naĝantan teron, inter konataj akvo-plantoj, apud konata ripozejo. Ĝi estas la renkontejo! Kaj lumo blindigas min subite kaj fermigas miajn okulojn svene. Mi komprenis.

„Ĉu vi komprenis?“ diras gravece Mareno, rapide saltinta al mi. La rondaj okuloj rigardas min. Mi sentas lian bruon spiron. „Kial vi trompis mian filinon? . . .“

Mi, kun la pafilo en la dekstra mano, kun la maldekstra laŭlonge de l' korpo, rigardas lin mirigite. Kaj io malvarma envolvas min, kiel serpento, kiu plektas sin ĉirkaŭ la korpon. Mia gorĝo sekigis, la lango estas peza. Eĉ vorton mi ne povas eldiri. Kaj mi scias, komprenas, kio okazos! Mi imagas ankaŭ tion kio okazis. Kvazaŭ al la streĉita orelo venas per la bloveto de l' vento flustranta tra la kanaro, perdita voĉo, kiu scias de kie, de estaĵo, kiu pereas en la marĉo, malproksime, aŭ kiu eble eĉ pereis jam.

„Niĉjo! Niĉjo!“

Mi eksaltas. Kaj dum momento, senvole maskiĝas la demando:

„Kie estas Kiva? Kion vi faris kun ŝi? . . .“

La pafisto rikanas: la rondaj okuloj havas la brilon de la profunda akvo de Jezer. Kaj jen eksonas voĉo — voĉo preskaŭ fremda, malalta, laca, teruriga — tamen la voĉo de Mareno:

„Kie ŝi estas? Kion mi faris? Kion? Sed vi kion vi faris? . . .“ Kaj li denove rikanis senmove, apud mi. „Nobelo! . . . moŝto. Ankaŭ ci agis kiel tiu alia, kiu mortis! . . . Li hontigis mian edzinon, malriĉigis min, persekutis min, kaj nun la nobelo denove aperas! . . . Denove li aperas! Kion ci faris, hundo! Diru, hundo, kial ci hontigis mian filinon? Kial ci mortigis ŝin? kial ci venenis min?“



Mi ne povas eĉ moveti min. En lia terura voĉo tremas malamo fermentanta depost dekoj da jaroj, malamo konsumanta, sennoma, la malamo de tuta gento eble subpremita, kaj mi vidas, mi tre klare komprenas, ke li neniigos min sen kompato, ĉar estas nek loko por saviĝo, nek momento por pardonó.

La manoj, la nodecaj manegoj, kun vejnoj kiel amasigitaj ŝnuregoj, jen aperas antaŭ mi, kun disaj fingroj, leviĝantaj al mi, al mia kolo. Ili moviĝas, malrapide moviĝas, kiel nigraj bestoj mortpremontaj mian kolon, kaj mi komprenas, en fulmolumo, ke, se mi ne ektiros la ĉanon senhezite, se mi ne rapide klinos la pafiltubon nur dum momento, kaj se mi ne pafos, ĉio finiĝos. La fingroj ĉirkaŭpremos mian kolon kaj sufokos min!

Kaj tiam, mi ne scias kiom longe daŭris, mi ne scias kiom da tempo bezonis mia freneza teruriĝo min ŝtoniginta, ke ĝi liberigu mian spiron, malrigidigu miajn manojn. Sed ŝajnis eterneco dum mi rigardis ankaŭ en la vaston de l' malluma Jezer, plena de haladzo, plena de mistero kaj densa mallumo, en kiun tamen filtris sin sangaj ŝiraĵoj, dum mi pensis ankaŭ pri Kiva eble vivanta, eble sternita, kun la brakoj antaŭen, funde de la nigra akvo, en la ŝlimo, inter herbaĵoj. . .

Kaj mi sentis la pezajn manojn, kaj vidis la malbonvole brilantajn okulojn, kiuj preskaŭ bruligis min; la tubo kliniĝis kaj la kunkurbita fingro de l'dekstra mano salte rektiĝis!

Eksonis longa tondro tremiganta profundajn verdejojn maljunajn. Kaj ankaŭ mi falis, kvazaŭ en senfinan mallumon.

Kiam mi malfermis miajn palpebrojn al la steloj, apud la mortinto kun la okuloj senmove blankaj, mi sentis ankoraŭ ĉirkaŭ la kolo la premon de fera ringo.

## EN ARBARO PETRIȘOR

Estis fino de Aŭgusto, kaj la arbaro Petrișor, maljuna kaj nedifektita de homa mano, silente disvolvis la foliaran arkajon. Ĝi milde suriris longecajn montetojn, leviĝis malproksimen je danĝera altaĵo, de kies pinto, kiel sago, altiĝis ĉielen malnova pinarbo, unue anoncanta per profunda muĝo la alvenon de l' ventoj. Tiel ĝi supreniris kviete okcidenten, kaj de la orienta ĉielo la suno komencis penetri ĝiajn profundojn.

Ĉe la randa arbitajaro la lumo filtris densan, varman radioplumon; svarmoj da muŝetoj rondflugadis, kunplektiĝis en rapida ludo, jen brilante en lumo, jen malaperante. Oriolo kuŝis senmova sur fagobranĉo etendiĝinta al la suno, ĝia plumaro brilis kiel ovoflavo; ĝi etendis sian koleton de tempo al tempo kaj eligis pepofajfon kiu vekis fortan eĥon inter la branĉoj de l' arbaro. Birdetoj surŝutitaj de diversaj koloroj, vokis unu la alian de sur elastaj branĉetoj: kardeloj estis kun sangmakuloj, paruoj-globetoj kun griza kaj nigra plumaro, fringeloj kun brikeruĝaj brustetoj. Ili rigardadis per la okuloj brilaj kiel pinglopintoj, jen ili malfermis la bekojn kaj kantis melodijajn vokojn, jen malpeze forflugis kaj post ili ekbalanciĝis la vergoj, tremigante la brilajn foliojn.

La vibrado de l' etulara vivo filtriĝis tra tiu rando arbara, kiel dum ĉiu somermateno. Aro da insektoj kun diafanaj flugiloj, bluaj flugiletoj, kunkruciĝis, papilioj ludis super la densa herbaro, kie varmaj parfumoj kolektiĝis.

Kaj en kaŝejo fosita en la tero, inter foliaro kaj stoplejo, sidis ruĝeta leporo, kaŭre, kun oreloj lasitaj sur la ĝiba dorso. Karesita de la varmo, ĝi dormetis: subite malfermis la okulojn, poste malrapide fermis ilin kaj movetadis la fenditan nazon, kvazaŭ en sonĝo.

Sur la vojetoj, ene, ankoraŭ estis malseke. Nur kelkloke, ĉe senarbejoj, eniĝis longaj radigarboj oraj. Filikeroj saltadis de la radikoj de l' pinarboj, plenaj je diamantaj gutetoj; maldika pajlo trapenetras la mortan foliaron kaj alportis al radio, donace, bluetan fajron. Estis plena trankvilo, sed en la grandaj densejoj, ĉi-kaj aliloke, vivomovo estis sentebla: enpenetras malklara voko, mola, estingiĝanta; malgrasa karpeno ŝanceliĝis, kelkan tempon zumis la flavaj folioj de l' pasintaj jaroj.

Tagmeze voĉo de korno flugis de herbejo al herbejo. La ĉashundaro eĥe respondis: kiaf! kiaf! Ankaŭ homaj voĉoj aŭdiĝis. Kaj sur la vojetoj, el la lumo enpaŝis du homoj per la okuloj esplorantaj la densejojn. Unu estis „la boero“<sup>1</sup> rekonebla pro la verdŝtofa vesto, ĉapeleto kun garola plumo, pura kaj brila pafilo, sen ĉano. Li estis ankoraŭ juna viro, plenvizaĝa, saneruĝa, kun eta liphararo blonda, kun ventregeto. Bone nutrita homo, kun kontenta mieno, kaj gajaj okuloj. La alia, la arbaristo, estis alta kaj larĝŝultra plenfortulo, kun dika liphararo malhela, sed kun klara kaj serena rigardo. Li havis ĉe la kokso, maldekstre, saketon kun latunaj butonoj, kaj ŝultre li portis pafilon, sub kies ĉano, por ke ne rustiĝu la ŝtalo, li metis po unu peceto de leporelto.

„Voku do, Vasie, la hundojn . . .“ diris la boero, turnante sian kapon al la arbaristo.

<sup>1</sup> Boero = rumana nobelo. La kamparanoj tiel nomas ankaŭ la bienestrojn, sinjorojn.

Vasile prenis de la kokso, dekstre, la kornon, levis ĝin al la buŝo, kaj eligis tri longajn voĉojn direktitajn reen, al la rando arbara. Ankoraŭ vibris la dolĉaj resonoj, kiam respondis unu hundo, akre bojante trifoje.

„Jen mia ĉashundo“, diris Vasile, etendante la orelon. Alia bojo, pli plena, pli forta, estis aŭdebla. La arbaristo komencis vokadi:

„Na, na, Friŝka, naa!“

La bojoj proksimiĝis. Bela, nigra hundo, kun ruĝeta nazo, aperis survoje je dudek paŝoj, ĝi rigardis dekstren, maldekstren, poste ĝi kuris al la du ĉasistoj.

„Tien ĉi, Osman!“ krias la boero. „Kie vi estis, fripono? . . .“

Rampante, kiel lacerto inter arbetoj, suriĝis la vojeto ankaŭ la hundo de l' arbaristo, malforta, ke ĝiaj ripoj videbliĝis tra la felo. Vasile levis la manon kaj kliniĝis al la hundo. Friŝka veboje surkuŝis la teron, poste eksvingis la voston.

„Nun ni ekiru, moŝto Grigorica<sup>1</sup>, diris la arbaristo, returnante sin. „Ni iros ĉiam pli antaŭen. Kaj fine, sur tiu vojeto, ne estas eble, ke ni ne trovu kapreolojn . . . Mi vidis ilin ankaŭ hieraŭ . . .“

Ili ekiris kun senbrujaj paŝoj, en longaj botoj, sur la malseka vojeto. La hundoj trankvile vagadis malantaŭe.

„Jen, ĉi-loke, sur tiu ĉi rando, mi mortpafis du lupojn pasintjare“, diris Vasile.

„Ĝuste tie ĉi?“ demandis moŝto Grigorica.

„Ĝuste tie ĉi, du. Aliajn mi ja trovis aliloke . . . Kion mi faras, kiam ekneĝas? Nu, tion ankaŭ mi entreprenas . . . Mi preferas tiujn monstrojn, granda afero . . . Mi nek manĝas, nek trinkas, finiĝis! . . . Mi venas, moŝto Gri-

---

<sup>1</sup> Grigorica = Gregoreto, Gregorĉjo.

gorica, kaj trovas postsignon sur tiu ĉi vojeto ... Pluraj piedoj estis sur la neĝo ... Pasis Sankt Andreo, la sovaĝuloj vagadis are ... Mi trovas postsignon, mi esploras ĝin, mi retrovas ĝin ekster la arbaro, ĝis iu loko, mi trovas ĝin al la vilaĝo, poste elmarĉe, returne ... Mi ekpensas, ke ili estas en la marĉo ... Kaj mi tiel atingis la randon de l' arbaro, moŝto Grigorica, mi kliniĝis inter la arbetoj kaj mi komencis bleki al ili ... Mi blekas unufoje, mi blekas dufoje, ĝis kiam mi aŭdas, ke ili respondas al mi el la marĉo ... Tie ili estis, inter la kanoj ... Mi denove vokas ilin, kaj mi atendas iom ... Tiam mi rimarkis, ke ili elvenas ... Sesope ... Unu granda, antaŭe, jen tia, moŝto Grigorica, (kaj Vasile blasfemis kaj montris per la mano, de la tero, la alton de la lupo). Mi ekblekas, ili haltas, flaras la venton, poste ili ekiras al mi, trenante la vostojn surneĝe ... Mi silentas ... Ili proksimiĝas. Tiam mi levas la pafilon, kaj mi elektas la plej antaŭan, la plej grandan ... (Nun Vasile denove insultis, patrinflanke, la grandan lupon antaŭan). Mi elektis ĝin, moŝto, kaj pafinte, ringo fariĝas sur la neĝo ... Kaj kiam la dua saltas sur tiun ĉi, mi prenas ankaŭ tiun al la okuloj, kaj malŝarginte, mi renversigas ĝin kruce sur la unuan ...“

Kun alia blasfemo haltis la arbaristo, reregardis al la hundoj, poste li esploris la ĉanon de l' pafilo.

„Kaj la aliaj?“ demandis moŝto Grigorica.

„La aliaj foriĝis al la patrino de l' diablo. Kial ili atendu ankoraŭ?“

La boero kontente ridetis. Dumire li elprenis la tabakon, donis cigaredon al la arbaristo, ankaŭ li mem ekfumis unu; Vasile frotis fajroŝtonon, ekbruligis, kaj nun ili iradis silentaj tra la malvarmeto de l' arbaro, sub la arkoj de la branĉoj, tra radifalaĵoj, jen tie ĉi, jen tie.

Sciuro grimpis sur branĉotrunko en ilia vojo. Momenton ĝi rigardis per la nigraj okuletoj, ĝi postkuris branĉeton, saltis kiel bruna harpilko al alia branĉo kaj perdiĝis inter la folioj. La boero ekatentis, kun la mano sur la pafilo; poste li trankviliĝis, kiam Vasile diris:

„Jen kompatinda besteto . . .“

Tiel ili iris kelkan tempon en plena trankvilo, tra la malseka, akraodoro de l' arbaro. Pegoj martelis la arboŝelojn, melodiaj voĉoj venis de malproksime kaj estingiĝis inter la senmova foliaro.

Foje haltis la arbaristo.

„Jen tie ĉi, moŝto Grigorica“, diris li. „Ni iru tiel, dekstre, tra tiu ĉi valetto. Gardu vin de la branĉaro, ĉar ĝi estas densa, diable! En la valo estas tre malseke, ne malproksima estas la rivereto, tie estas la postsignoj. . .“

Ili venis malsupren, dekstre, sur la milda deklivo, tra pradensejo ŝajninta muraro netrairebla.

„Senbrue . . .“ diris Vasile. Kaj la voĉo ricevis strangan resonon, tremantan kiel ventoblovo en la valo.

Refoje ili iris kelkan tempon kaj ree haltis. La hundoj maltrankvile esploris. Vasile kliniĝis super la malsekan argilon.

„Vidu, rekonebla la freŝa postsigno . . .“

Ankaŭ moŝto Grigorica kliniĝis, atente rigardante. Poste li metis la saketon maldekstren, la ĉasponardon dekstren, plifirmigis la ĉapelon sur la kapo kaj preparis la pafilon.

„Haj, Osman!“ vokis la arbaristo la hundojn. „Ekmovu la nazojn! Venu ankaŭ vi, Friŝka! . . . Ĉu vi ne sentas kapreolodoron? . . .“

La ĉashundoj subite ekiris laŭlonge de la deklivo kaj malaperis inter la arbetoj.

Vasile diris:

„Nun ni iru al la maldensejo kaj atendu . . . ili devas peli ilin . . . Ĉi-hundo mia, kiel vi vidas, konas ilin . . . Ĝi portas, moŝto Grigorica, la kapreolon al la buŝo de la pafilo . . .“

La juna boero estis iom maltrankvila. Li profunde spiris dufoje kaj postiris Vasile-n, kun preparita pafilo. En la milda valo malfermiĝis senarbejo kvazaŭ dormanta en lumopulvo, en majesta soleco.

La arbaristo turnis la kapon. La boero ekskuigis. Hundbojo aŭdiĝis dufoje en la fundaĵoj, kvazaŭ sub senfina arkaĵo.

La du homoj atendis. Neniu birda voko estis aŭdebla, eĉ insektoj ne ĝenis la lumon. La bojado de l' hundoj denove komenciĝis, foje pli forte, foje male, en regulaj intertempoj. La arbaristo levis la ĉaskornon al la buŝo kaj sonigis ĝin dufoje, — kaj la arbaro ŝajnis reviviĝi, ĝis malproksime resonante.

Foje neatendite, kiam ili aŭskultis kun atentemaj oreloj la resonantan hundobojon, — el la densaj arbetoj subite aperis, bruetante, griza kapreolino, kun maldikaj kaj lertaj piedoj. Kiel sago ŝi pasis preter la boero, je dek paŝoj.

La arbaristo ekmoviĝis. Moŝto Grigorica suprensaltis, kvazaŭ time vekiginta el sonĝo, kun rapideco li levis la pafilon al la okuloj kaj rapide eligis du fajrojn, unu post la alia. Tra la disiĝanta fumo li vidis la kapreolinon en ŝia ventokuro laŭlonge de l' herbejo. Li glutis dufoje, kun tremantaj manoj premadis la pafilon kaj ŝargis ĝin denove. Sed post la fumo foriĝinta jen staras la arbaristo kun la armilo ĉe la okuloj.

„Pafu!“ krias moŝto Grigorica.

La pafilo de Vasile ektondris. Ĝia krakobruo atingis la sonojn de l' unuaj du pafokrakoj. La sovaĝulino for-

saltis inter la branĉoj, poste ili ambaŭ rimarkis ŝin kiel fantomon inter la brunaj trunkoj kaj ĉesis ŝin vidi.

La arbaristo ŝargis la pafilon. Li diris trankvile:

„Ŝi estis tro malproksime. . .“

La boero estis ekscitita kaj ĉagrenita.

„Diablo, kiel ŝi venis tiel?“ diris li rapide. Mi eĉ ne atendis. . . Mi priatentis la hundojn. . . Tro rapide mi pafis . . . mi rapidis. . .

„Senrimarke okazis. . .“ diris malrapide Vasile. „Sed nenio. . . La hundoj devas peli al ni alian. . . Tie ĉi estas ilia densejo. . .“

Nun ili aŭskultis kun atentaj oreloj. La hundoj venis bojante. La arbaristo denove albuŝigis la kornon.

„Diablo, kiel?“ flustris mirante la boero kaj rigardis de proksime sian pafilon.

La silento etendiĝis. Ne plu estis aŭdebla la bojado de l' hundoj. Kaj tra densa arbetejo, malgrandaj herbejoj, la kapreolino kuris pelata de timego, malproksimen, al la rivereto. Momenton ŝi haltis tremante, kvazaŭ antaŭ abismo. Poste, malrapidigante la kuron, ŝi faris lokon por si tra la foliaro, en la rivereto. Kun la du antaŭaj piedoj en ondoj, kun la aliaj en la herbaro surborda, ŝi staris samloke. Ŝia pelto briletis en ombroj: nur kun la delikata kapo, pintaj oreloj, grandaj okuloj, ŝi staris en lumulaĵo. Ŝi aŭskultis iom. Poste ŝi klinis la kapeton kaj per la nazo altuŝis la akvon apud la maldikaj piedoj. Ŝi denove levis la okulojn. Tiam en la klarajn ondojn falis sangoguto. La antaŭa piedo maldekstra iom kuntiriĝis kaj ekstremis. El la ŝultro sango fluetis. Poste pli ofte falis guto post guto, malklariĝis la akvo de la rivereto. La kapreolino milde klinis la kapon, kvazaŭ en la nebula spegulo ŝi volus rigardi la antaŭan duonon de l' korpo, en halta movo. Poste ŝi ŝajnis iom ĝemi kaj turnis la



nigran nazeton al la sangmakulo. Tiel ŝi staris. De tempo al tempo ŝi kliniĝis al la akvo. De tempo al tempo tremis la griza felo. Kaj malproksime malantaŭe sonis la ĉaskorno, kaj estingite, malforte penetris la hundbojo.

Malrapide ŝi retiriĝis al la surborda herbaro, ankaŭ la okulojn retiris en la ombron. La lumo falis nur sur la akvon. Ŝi suriĝis la molan tapiŝon. Foje-foje ŝi turnis la kapon al la sanga vundo. Sed sur la vojo, kie ŝi venis, neatendite aperis timigita kapreolo kun kornetoj alte tenitaj. Li etendis la kapon, priflaris ŝin. La kapreolino bleketis mallaŭte, apenaŭ aŭdeble, kvazaŭ ŝi estus dirinta ion malgajan, kaj levis la sekan nazon al la virkapreolo. La ĉaskorna voĉo travibris la resonajn arkaĵojn: la virkapreolo skuiĝis, lerte transsaltis la rivereton kaj malaperis en la densejo. Kvazaŭ timiga kaj fortodona teruro estus ŝin influinta, la kapreolino leviĝas kaj denove eniras la akvon. Lametante, nur sur tri piedoj, ŝi ekiris kun etaj saltoj malsovaĝaj, supren laŭ la rivereto. Ŝi iris al la monteto kaj la sangogutoj konstante fluetadis laŭlonge de la maldekstra piedo kaj ili densiĝis je ruĝaj strioj. Ĉirkaŭe la branĉoj estis senmovaj; sur la bordoj dum ŝia preterpaso filikaro kliniĝis kaj denove rektiĝis, ekvilibrante sin; iom da tempo silvio ĉirpetis super ŝi, poste ĝi malaperis ie.

La tempo pasis. Foje-foje ŝvebis malvarma nebulo. En la maldensejoj la lumo tiriĝis al la pintoj de la branĉoj; grizŝela tremolo apenaŭ movetis la maldikajn branĉetojn kaj tremigis la arĝentan folietaron rebrilantan en du speguloj.

La kapreolino iris supren laŭ la rivereto, al la monteto. Dekstre kaj maldekstre kreskis la bordoj. La ondoj venis pli rapidaj, ili murmuris inter la akraj ŝtonoj, jen saltis, jen dispeciĝis je arĝentaj buleroj. De ŝtono al

ŝtono ŝi ŝanĝis la hufojn nigrajn kiel ebono kaj ŝi grimpis malrapide, dume sur ŝia piedo fluis la varma sango.

Supre, sur la altaĵo, altiĝis al la blua ĉielo la pinarbo, anoncanto de l' ventoj. Pli sube, en ŝtona kavoj, meze de rondo da betuloj, la rivereta akvo kolektiĝis je klara lago. Ĝi treme falis, glitante sur la musko de roko, kuniĝis, disiĝis, trankviliĝis en surfaco respegulanta la ĉielon kaj la helajn buklojn de la betularo — poste ĝi refoje striiĝis kaj pluiris en la valo kun milda glito kaj senfina murmuro.

La kapreolino haltis inter la betuloj, en alta herbaro, en malvarma ventoblovo forpelanta la ankoraŭ varmajn bonodorojn de l' sovaĝaj floroj. Ŝia kapo kun la nigraj, malgajaj okuloj tuj aperis sur la akvospegulo, ĉe la bordo. Ŝi kuŝiĝis laca, malforta kaj restis muta, kun rigardo fiksita je la akvo, en la majesta trankvilo de l' arbarego. Ŝajne ŝi aŭskultis, ŝajne ŝi meditis, kaj de temp' al tempo trakuris ŝin tremo kuranta sub ŝia haŭto.

Ĉirkaŭ ŝi kreskis la ombro. La sunbriloj forviŝiĝis de la pintoj. Malofte ekstremis la arbaro, poste ĝi iĝis trankvila, kvietaj, kiel alimonde. Kaj la kapreolino restis sola; ŝia sango fluis en la mola herbaro surborda. Foje ŝi klinis la nazon al la surfaco, poste ŝi denove restis senmova. El senfina malproksimo alpenetris la melanoliaj akordoj de l' ĉaskorno, ĉiam pli malklaraj la hundbojo mutiĝis; rapide alvenis la vespero, kaj la pinarbon sur la altaĵo trapasis malgajaj ĝemo. En la trankvilo, sur la malhela ĉielo en la akvofundo, ekstremis la ora larmero de l' unua steleto. La kapreolino apenaŭ aŭdeble muĝetis kaj ŝiaj okuloj brilis malgajaj en la lasta lumo de l' bordo. Tiel ŝi kuŝis sola kaj mortis sub la buklo de l' betuloj kun la blankaj trunkoj.

## LA SCIIGANTOJ<sup>1</sup>.

Estis du knaboj etaj kiel pugno, kun egaj peltĉapoj ĝis sur la okuloj, kaj enpakitaj en lanjakoj kun longaj manikoj. Kvankam ili ekiris tagmeze, estis ankoraŭ longa la vojo, ĝis vilaĝo Viiŝoara, longa kaj malfacila, tra la neĝo, kaj nun, malfrue, ili pene trenadis la sandalegojn vinditajn per pajlo.

Dum la kristnaska festo jene iradis la knaboj, kun la stelo, al la pli riĉaj vilaĝoj. Ankaŭ ili ricevis kuraĝon, kaj ekiris kun la stelo tra la kampoj, tra la glacia ponto de Siret<sup>2</sup>, al la valo kolormakulita de la sennombraj dometoj de l' viiŝoaranoj.

La vesperkrepusko metis dubebluan ombron sur la senmovan neĝvaston. Kaj ili pene iradis; ili ĵus finis la interparolon kaj kvazaŭ ne plu kuraĝis rigardi unu al la alia. La sonorileto de la paperstelo de tempo al tempo eksonis super ili. Ili levis siajn kapojn kaj elrigardis de sub la randoj de l' peltĉapoj al la horizonto. Nenio estis videbla. Ili apenaŭ proksimiĝis al Siret.

En la spegulego de l' rivero ekstremis la lumeroj de la supraj steloj. Kaj profunda silento regis, kvazaŭ ŝtoniĝis la nigra senarbejo, preter kiu ili pluenŝovis sin, irante laŭlonge de la bordo. La sandaloj akre sonis sur la glacio. Ili reciproke ĉirkaŭbrakis la ŝultrojn kaj malrapide pasis transen, sur la brila plataĵo, tra la mistera silento de la vesperiĝo.

---

<sup>1</sup> Laŭ kutimo en Rumanujo, kristknaskan vesperon infanoj vestitaj je Tri Reĝoj kaj Herodo iradas de domo al domo portante lumigitan paperstelon, por prezenti la historion pri la naskiĝo de Jesuo.

<sup>2</sup> Siret: rivero en Moldova, Rumanujo.

Suririnte la alian bordon, ili ekhaltis, rigardante antaŭen. La vilaĝo ne estis rimarkebla. Ili turnis sin unu al la alia. La lipoj de la pli malgranda ekstremis.

„Oni nenion povas vidi!“ murmuris la pli granda. Kaj la voĉo de l' etulo plore sonetadis:

„Ni erarvojiĝis. Kion ni faru nun? La lupoj manĝos nin . . .“

La granda malfacile englutis la ploron kaj diris:

„Jonika<sup>1</sup>, ankaŭ paĉjo-maljunulo<sup>2</sup> diris, ke foje lin kaptis neĝblovado kaj li iris antaŭen, kaj li savis sin . . .“

„Al mi estas malvarme!“ balbutis la malgrandulo.

„Enigu viajn manojn en la manikojn, bone, — kaj kunigu ilin sub la mentono. La stelon portos mi. Kiam ni alvenos, ni kantos kaj ni petos iun, ke li gastigu nin dum la nokto.“

„Ĉu vi estas malsata?“

„Jes.“

„Oni donos al ni ankaŭ manĝaĵon. Sed vi kantu bone! Ĉu vi ne forgesis „Tri Reĝojn?“

„Mi ne forgesis“, respondis la etulo sorbspirante per la nazo kaj retenante sian ploron.

Ili marŝis pluen en la griza lumo de l' vespero. Antaŭ ili, post ili, neĝa dezerto; ŝajnis, ke la malvarmo kreskas, kaj la neĝo akre grincis sub la sandaloj. De temp' al tempo ili haltis dum momento, kun timiĝintaj animoj, provis trafenetri la ombron, kiu ĉirkaŭis ilin, esperante, ke ili ekaŭdos brusignon pri homa vivo. Foje, en tiuj intertempoj estis aŭdebla la akra grakado de l' korvoj, miksita kun la malforta krietado de la monedoj, malproksime, kiu scias super kiu senarbejo. Sed tiu ektimo rapide pasis. Ili iris pluen en silento, ĉiam pli eniĝante

<sup>1</sup> Jonika = Johaneto, Joĉjo.

<sup>2</sup> „Paĉjo-maljunulo“ = avo.

en la mallumon, kaj retenante la ploron per streĉitaj makzeloj. Tiel ili penetris tra la nokto, kvazaŭ la frostotremiga soleco estus doninta forton al ili. En iliaj infanaj kapoj, tie, sub la ŝafpeltaj ĉapoj, resonis la sanktaj kantoj pri la naskiĝo de la Savinto. Pensante pri tiuj, ili pensis ankaŭ pri la varma kuŝejo, ankaŭ pri la vaporo de la manĝaĵo en la vilaĝo, kien ili ekiris. Ili nek la misteron de tiu vespero povis bone kompreni, nek la kantojn altigotajn per iliaj puraj voĉoj, tamen ili portis sciigon gravan, kun la stelo, sub kiu ili kurbiĝis, levante siajn ŝultrojn kaj kunpremante sub la mentono la manikojn de la peltjakoj.

Por la malgranduloj kaj humiluloj, por ke iliaj animoj esperu kaj konsoliĝu, foje aperis stelo kaj naskiĝis ideto, kiu pli poste plenigis la mondon per la lumo de l' boneco. En humileco naskiĝis la sankta infano, humiligite li vivis, humile li portis la krucon al la ekzekutejo preparita por li de la malbonuloj; pro la aro de malriĉuloj li mortis. Sed en la animoj de la malgranduloj de tiam brilis senĉese la lumo de la kredo je pli bonaj tagoj, — kaj tiun esperon iris sciigi la du infanoj, sen konscii pri tio. Ili iris kun siaj kantoj, kun sia stelo, por plenigi per bonvolo la korojn de la homoj, kaj ili iradis, frostotremante kaj ĝemante tra la vintra nokto, — kaj super iliaj kapoj la sonorileto dolĉe tremsonis.

„Jonika, ĉu vi tre frostas?“ demandis Vasile, la pli granda.

„Miaj manoj rigidiĝis ĝis la kubutoj...“ ekĝemis la etulo.

Ankaŭ la pli granda sentis malvarmon kaj tenis ĉirkaŭbrakita la tenilon de la stelo kiel lamulo, ĉar siajn manojn li ne plu povis uzi. Liaj larmgutoj fluadis pro doloro, malsekigante la okulkavojn.

La etulo diris:

„Kion ni faros, ĉar la vilaĝo nenie vidiĝas?!“

„Nun tuj ni rimarkos la lumojn de la fenestroj,“ respondis Vasile.

„Sed se ni erarvojiĝos?“ Aperos la bestegoj.

„Tiam ni preĝos al Dio kaj li savos nin de ili.“

En tiu ĉi soleco, al ambaŭ, la vorto „Dio“ havis specialan resonon, tute alian, ol en la preĝoj vente diritaj vespere kaj matene. Estis io mistera, kion ili ne povis trakompreni.

Kaj ili penetris pluen, — ŝajnis al ili, ke ili migradas sennombrajn horojn; la malgrandulo malofte direktis al la alia kelkajn vortojn kun timigita voĉo; ili malofte turnis sin duone, rigardante unu la alian kaj vidante sin nigraj, kiel ombroj. Kaj nur tre malfrue la humilaj sciigantoj ekvidis la lumstelaron de l' vilaĝo ondante el la mallumo, — kaj kiam ili enpaŝis la stratetojn ĉirkaŭitajn de nigraj bariloj, ŝajnis al ili, ke la frostoj malfortiĝis. Dum furioza bojado de hundo ili eniris korteton. Vasile per bastono ŝirmis la stelon, — kaj la sonorileto timvoĉe eksonis ĉe la fenestroj.

La pordo de la granda domo ekbruis, poste malfermiĝis la ekstera pordo kaj ĉe la sojlo aperis nudkapa vilaĝano.

„Ĉu vi akceptas stelulojn?“ demandis Vasile.

Lia voĉo estis tiome malforta kaj timtremanta, kaj la etulo tiom rapide ekĝemis, superŝutita de larmoj, ke la viro kortuŝite kliniĝis al ili.

„Vi ne estas de tiu ĉi vilaĝo, aĉuloj, — he?“

Poste li kriis al la hundo: „Hi, fiulo! — kaj vi, etuloj eniru do la domon. — Edzino! malfermu la pordon, por ke envenu la stelo . . . Tiel . . . ĉu vi estas homoj, aŭ glacipecoj? . . . Singarde, por ke vi ne albatu la stelon al la pordosupro : . . .“

La frostitaj sandaloj de la knaboj bruis kiel botoj. Ili eniris la domon; la stelo milde kaj gaje sonoretis: cing-ling!

La domestro, juna homo, proksimume tridekjara, largdorsa kaj plenforta, rigardis ilin kvazaŭ miraklon.

„De kie vi estas, knabetoj?“

„De Bordeeni,“ respondis la granda.

La lumo kvazaŭ blindigis ilin kaj ili preskaŭ fandiĝis pro la varmo.

„Demetu viajn suraĵojn, bravuletoj,“ diris denove la viro.

Vasile singarde demetis la stelon apud la ikonoj<sup>1</sup> kaj komencis senvestigi sian fraton. La edzino, maldiketa kaj ankoraŭ juna, leviĝis de la tripeđa tableto kaj rigardis ilin mirigite, kun la manoj ĉe la kokso.

„Vi havas bonŝancon!“ ekparolis denove la mastro.

„Ĝuste nun ni estis ekmanĝontaj. Ankaŭ vi manĝos kun ni, ĉar ni ja havas sufiĉe, dank' al la Sinjoro! Sed unue vi kantu al mi, ĉu vi komprenis?“

La etulo ankoraŭ ploretadis. — La viro turnis sin al la kameno.

„Sed kie estas Gica<sup>2</sup>? He, friponeto venu malsupren! kial vi forkuris? ne timu, ili ne manĝos vin, ankaŭ ili ja estas knaboj kiel vi. . .“

Ĉe la kamentubo aŭdiĝis murmureto, poste blonda kapeto kaj fingro bore ludanta en la nazo, montriĝis en la lumo.

„Venu tien ĉi,“ diris la patrino, kaj ekprenante lian manon, ŝi tiris kaj portis lin en la mezon de la ĉambro, apud la tableto, sur kiu vaporis la supo kaj la maizaĵo. La infano, nur dujara globeto, timeme rigardis la ventojn kaj nodiĝinte sur la tero, li retiradis la maneton, kiun tenis lia panjo.

La mastro returnis sin al la steluloj:

„Ĉu vi finis? Nun antaŭ ĉio senfrostigu la manojn. — Do, vi estas el Bordeeni? Kaj kies infanoj vi estas?“

---

<sup>1</sup> Ikono = sanktulbildo.

<sup>2</sup> Gica = Georgĉjo.

„La filoj de Jon<sup>1</sup> Balaŝei,“ respondis la granda.

„Mi ja konas lin!“ diris la majstro. „Kaj kiel li lasis do vin eliri en tia frosto?“

„Ni mem ekiris solaj.“

„Kaj ĉu vi ne timis la lupojn?“

La infanoj ne respondis. La mastro ridetante rigardis ilin. Poste li denove demandis:

„Sed ĉu vi scias, kio okazis en Betlehemo? Kantu do al mi tiun kanton pri nia Sinjoro Jesuo.“

„Ni scias ĝin!“ respondis rapide Vasile.

Ili ambaŭ alproksimiĝis al la sanktulbildoj, levis la stelon sub la lampeto konstante brulanta, iom skuētis ĝin, kaj la sonorilo eksonis. Poste ili levis la okulojn al la lumokrono ĉirkaŭanta la kapon de la Dipatrino kun la ideto ĉe la sino, kaj ekkantis kun puraj voĉoj:

„Tri reĝoj de Oriento

Vojaĝantaj kun la stelo.

Kaj ankaŭ la domestro rigardis al la ikonoj kun okuloj nebulitaj de pensoj, kaj la knaboj kantis kun altsonaj, molaj voĉoj kun koloj alte levitaj. Ili ĉesis momenton, glutis kaj ree ekkantis, anoncante la naskiĝon de la Savinto. La patrino prenis Gica-n en la brakojn kaj nun aŭskultis kvazaŭ trapenetrita de la mistero de tiu vespero kaj ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj. Kaj en la tuta domo regis trankvilo, kaj en la silento la voĉoj de la infanoj kantis la bonan sciigon. La fremduletoj tremante venintaj tra frosto kaj mallumo, kaj la nekonatoj, kiuj gastame malfermis al ili la pordon, nun sidis interfratiĝinte, kaj la simpla kanto pleniĝis la animojn per konsolo kaj lumo.

<sup>1</sup> Jon = Johano.





BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

386 1

